

1986 julio-aŭgusto
79a jaro
n-ro 967-968 (7-8)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

esperanto

ISSN 0014-0635



La Centra Oficejo kaj UEA sub lupeo

Vi trovos

denove malfruan numeron, kiu devis aperi ja post la junia, kiu – laŭ decido de la Estraro – samkiel pasintjare, ne estis sub la respondeco de la redaktoro. Kiel la redaktoro, mia prioritato estis forigi la prokrastojn. Post du jaroj en tiu posteno ankoraŭ ne ekzistas la kondiĉoj por akurati la aperadon, kaj la necesaj ŝanĝoj restis ekster la respondeco la redaktoro. Ĉi tiu numero do estas mia lasta ankaŭ pro tio, ke oni deziris, ke mi – laborinte jaron ĉe *El popola Ĉinio* en Pekino – ne redaktu la kongresan numeron. Hazarde, ĉi tiu numero havas artikolon pri la problemoj de la CO, kies oficistoj delonge pledas por funda analizo cele al strukturaj ŝanĝoj en multaj aspektoj de la decidado, labormetodoj, planado kaj administrado de kaj inter la Estraro kaj CO. Se tio iam okazos, ĝia celo devas strikte esti la plej efika progresigo de la informado pri Esperanto al la ĝenerala publiko. Tion ĉiuj honeste intencas, sed kiom la intenco respondas al la realo?

Enhavo

- 121 **Administrado:** La CO kaj UEA sub lupeo (Diccon Masterman)
- 122 Testamenti
- 123 **Kultur-Festivaloj:** Etoso pridancinda ĉe Esperanto-festivalo en Svedio (Stefan MacGill)
- 124 **Informado:** Kion vortoj elvokas kaj kion ili devus elvoki (Claude Piron);
Interlingvistiko: Abundo da prelegoj (W. Verloren v. Themaat)
- 125 **Instruado:** IEI vigle profesiigas la Cseh-instruadon (Audrey Childs-Mee)
- 126 **38a IFEF-Kongreso:** Fervojistoj allogis 700 kongresi en Makedonio (Gernot Ritterspach)
- 129 **Lingvo kaj kulturo:** Frazologiaj sintagmoj en la Internacia Lingvo (Juan Régulo)
- 130 **Recenzoj:** *Li kaj ni; Festlibro por la 80a naskiĝtago de Gaston Waringhien* red. Reinhard Haupenthal (D. Blanke); *Pledo por unueca lingvo* de Richard Schulz (J. Lindstedt); *Principoj por elekto de matematikaj kaj stokastikaj terminoj en Esperanto* de Olav Reiersøl (Ch. Kiselman); *Amo kaj morto en Balio* de Vicki Baum (W. Auld); *Tri noveloj* de J. von Eichendorff (R. Cash); *La vualo de l' tempo* de J.H. Sullivan (G. Camacho)
- 133 **Kalendaro:** Renkontiĝoj, kongresoj, seminarioj ktp.
- 134 **Laste aperis...** (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 135 **Loke – Fake – Persone** (mallongaj novaĵoj)
- 138 **Oficiala informilo** (de la Centra Oficejo de UEA)
- 139 **Nekrologoj; Anoncetoj**
- 140 **Esperanto en radio**

La kovrilo

simbolas la Estraron, membraron, Centran Oficejon kaj Komitaton de UEA pro la ampleksa ĉefartikolo *La Centra Oficejo kaj UEA sub lupeo* de Diccon Masterman, eksa Konstanta Kongresa Sekretario. Dum almenaŭ la pasintaj dudek jaroj troviĝas la endemio, ke la Centra Oficejo ne povas senkrize funkcii dum pli ol kelk-monata periodo. Unu kialo estas manko de elpensita planado, kiel tio, ke dungita "eldon-redaktisto" povis ekplenumi sian enspezigan taskon dum apenaŭ jaro! La nuna pli demokratia Statuto de UEA donas voĉdonrajton al la individuaj membroj, sed jam la duan fojon ne povis okazi vera elekto pro manko de sufiĉaj kandidatoj. Tio montras kiel kondamnendaj estas la kelkaj, kiuj malkuraĝe insidas kontraŭ UEA, sen honeste defendi sian vidpunkton en elektoj antaŭ la membraro, ... sed la apatio de la membroj estas fundamenta malbono. Movado kun revolucia mesaĝo rajtas atendi revolucion.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39;

Telekso: 23721 UEA NL; **Telegram-adreso:** ESPERANTO ROTTERDAM.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 105 landoj.**

Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Geoffrey Sutton.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US \$ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakvirlaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Umeda Yosimi, Aobadai 2-15-10, Meguro-ku, Tōkyō, 153 Japanio; ☎ (03) 770 64 86.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio; ☎ (06) 95 25 713.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; ☎ (1) 42 37 14 73.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

La Centra Oficejo kaj UEA sub lupeo

Estante membro de UEA, kiu provis dum preskaŭ kvar jaroj provizi servojn en la CO, mi volas profiti de tiu sperto por rigardi la agadon de la Asocio per kritikaj sed pli informitaj okuloj.

La celo de ĉi tiu artikolo estas: 1) Priskribi kelkajn problemojn de la interna administrado de UEA, 2) Konsideri eventualajn solvojn. Ĝi estas direktita parte al oficistoj de la Asocio, parte al la Komitato kaj ĉiuj novaj kandidatoj por asociaj postenoj en ĉi tiu elektojar, kaj parte al iu ajn membro aŭ funkciulo, kiu voĉdonas pri efektivigo de nova tasko sen iam ajn entrepreni tian efektivigon mem.

Problemoj

Laborfortoj: La esenca signifo de la Statuto de UEA estas, ke la Komitato proponas, la CO disponas, kio estas tute normala situacio, kiu kreas abismon inter idealo kaj realo. Ne mankas ideoj ĉe la Komitato; ja mankas rimedoj ĉe la CO.

La granda plimulto de la oficistoj en la CO laboras ĉefe por Esperanto, ne por si mem. Persona ambicio estas nerimarkebla. Ĉiun tagon ĉiu oficisto frontas nemastreblan kvanton da taskoj kaj pluiras ĝis elĉerpigo (de la oficisto, ne la taskoj!) en la espero iel venki. Multaj oficoj estas plenumataj aŭ de neniu aŭ de iu, kiu jam havas plentempan okupon. Ekzemple, mankas bibliotekisto por Biblioteko Hodler; kvankam UEA celas eldoni librojn, mankas eldonisto; unu sama homo dum iu periodo celis esti Ĝenerala Direktoro (ĜD), Direktoro de la CO, estro de la Libroservo, redaktoro kaj samtempe plenumis diversajn funkciojn de la Kongresa Sekretario!

Laborkondiĉoj: Ĉar mankas stabo por prizorgi la stabon de la CO (escepte de la purigistoj), laboro estas ofte interrompata aŭ malhelpata de la bezono okupiĝi pri la postuloj de la fizika ĉirkaŭaĵo (la oficejo) aŭ la laboriloj. Tempo perdiĝas dum oficistoj riparas la polvosuĉilon aŭ likantan tegmenton, ŝarĝas kaj malŝarĝas kamionon, movas meblojn kaj librojn...

Dum apenaŭ kredebla periodo (de jaroj!) la CO submetiĝis al konstrulaboroj; oficistoj dum tiu tempo laboris en fojaj polvonuboj, devis ĉesi uzi la komputilon, kiu ne toleras polvon aŭ marteladon...

La komputilo estas aparte menciinda. Tiu, kiu konceptis, instalas kaj daŭre prizorgas ĝin (kiam li povas trovi tempon vojaĝi al Roterdamo), pasintjare ricevis – kaj meritis – la agnoskon kiel plej elstara komitatano. Tamen, estas malfacile taksi, ĉu la komputilo estas ekonomia. Kiam mi pasintfoje hazarde vizitis la Centran Oficejon, oni petis min provi luti

dratojn en ĝi, ĉar ĝia tajpilo ne funkciis kaj estis neniu alia, kiu kapablis! Mi ankoraŭ memoras premsonĝe la horojn, kiujn mi perdis pro la paneoj de la komputilo.

Kvalifikoj de oficistoj: Ĉiu oficisto devas esti tre multtalenta. Ĉiu devas scipovi Esperanton tre bone, la nederlandan iome; necesas kapabli tajpi, funkciigi komputilon kaj prizorgi ĉiujn ceterajn fakajn aspektojn de sia posteno. La ŝlosilaj oficoj estas vere multifacetaj kaj postulas ne nur intelekton sed ankaŭ iniciatemon, inventemon kaj energion. Praktike, ĉiu laboras sendepende kun minimuma superrigardo.

Por allogi tiajn rarulojn, UEA ofertas salajron, kiu certigas, ke ambiciuloj kaj tiuj, kiuj devas zorgi pri familio, estas fortimigitaj. La cirkonstancoj en Nederlando signifas, ke estas malfacile konsideri ŝtatanon el ekster Eŭropa Komunumo. Sekve, taŭgaj kandidatoj estas apenaŭ troveblaj. Estas interese noti, ke ni eksperimente reklamis la postenon de turisma funkciulo ĉe la nederlanda laboroficejo kun la espero trovi spertulon pri turismo, kiu kapablas kaj pretas lerni Esperanton. Inter multaj simpatiaj kaj inteligentaj kandidatoj ni ne trovis eĉ unu kun adekvataj turismaj spertoj por pravigi dungon. Preskaŭ certe ni bezonis pagi pli por allogi sufiĉe kvalifikitajn homojn.

Indas konsideri aspektojn de specifaj oficoj: Mi kredas, ke nek la nuna Ĝenerala Direktoro nek lia antaŭulo volas aserti, ke eblis ĝis nun kontentige plenumi la universalan rolon de la ofico, ĉar la CO ĉiam forrabis tro da tempo. La malevoluo de la aliaj oficejoj de la Asocio kredeble estas ligita al tio. Estas nenio dubo, ke la ĜD ne povas plenumi sian rolon sen la apogo de fortaj direktoroj en la diversaj oficejoj; tion ne rekonas la Statuto (art.45), kiu permesas, ke la ĜD estu ankaŭ Direktoro de la CO.

La ofico de *Direktoro de la CO* havas vastan gamon da taskoj, kiuj postulas fundan konon de la movado kaj kombinon de teknika kaj estra kompetento.

Post kelkjara funkciado de la nova posteno de *Financa Direktoro*, ĝi iĝos vaka ĉi-jare.

Iam la *Konstanta Kongresa Sekretario* pasigis la plimulton de sia tempo en la kongresurbo, kaj aliaj faris la librotenadon, enskribadon de kongresanoj ks. en la CO. En posta epoko la KKS pasigis nur kelkajn monatojn en la kongresurbo. Nun la KKS restas en la CO kaj faras preskaŭ la tutan administran laboron. Tial UEA grandparte neglektas la kongresurbon kaj ĝian Lokan Kongresan Komitaton (LKK), kiu tamen konstante bezonas ties gvidadon, konsilon kaj sper-

ton. Oficiala kromtasko de la KKS estas turismo. La postuloj de la ofico ne estas adekvate plenumebaj de unu homo; tamen, ankaŭ por ĉi tiu posteno mankas oficisto.

Pasintjare unu *sekretario kaj membro-administranto* demisiis, la alia emeritiĝis. Ambaŭ postenoj restis vakaj dum jaro. Jam de pli ol unu jaro mankas la *Jarlibristo/Komputilisto* plentempa. La redaktoro mankas de la 30a de julio.

Testamenti

Se oni zorge tralegas la financajn raportojn de UEA ĉiujare, oni rimarkas, ke kvankam foje la spezokonto en difinita jaro havas negativan saldon, la kapitalo de la Asocio efektive kreskas. Tio okazas ĉar ni rekte ĝiras al la kapuala konto – do sen tuŝi la regulajn spezojn de la Asocio – ĉiujn grandajn donacojn kaj ĉiujn heredaĵojn, kiujn la Asocio ricevadas.

Multaj niaj fidelaj membroj, kiuj tra la jaroj ĝuis sian esperantistan vivon kaj spirite multe profitis pro la ekzisto de la mirinda lingvo de Ludoviko Zamenhof, memoras Esperanton kaj UEA tiam, kiam ili skribas sian testamenton. Tra preskaŭ okdek jaroj, UEA daŭre laboras por sukcesigi Esperanton kaj por ebligi, ke ĉiam pli kaj pli da homoj ĝuu tiun lingvon. Granda parto de ĝiaj rimedoj venis kaj venadas el heredaĵoj.

Kvankam skribi testamenton estas iom malagraba tasko, estas tre grave, ke tiuj, kiuj eventuale ŝatus laŭ tiu maniero helpi al UEA, efektive faru testamenton. Kompreneble ne necesas, ke oni informu la Asocion, ke oni tion faris – kvankam se oni informos nian estraron pri financo aŭ nian ĝeneralan direktoron, tiu informo restos strikte konfidenca. Nia estrarano pri financo, s-ro Maertens (kiu samtempe estas prezidanto de la Asocio) ĉiam pretas konsili al homoj, kiuj faras siajn testamentojn, pri la plej bona maniero mencii UEA aŭ la plej bona maniero aranĝi siajn aferojn por eviti nenecesajn impostojn aŭ aliajn komplikojn.

Ankaŭ ekzistas en diversaj landoj juraj procedoj por fari grandajn donacojn jam antaŭ la morto kaj daŭre utiligi la renton por la propraj bezonoj.

Ni fine atentigas, ke Universala Esperanto-Asocio, kun sidejo en Roterdamo, havas nederlandan juran personecon kaj ke estas jure eble el ĉiu lando de la mondo testamenti al UEA same kiel tio validas favore al fizika nederlandano.

La decidofara ĉeno: Teorie la Komitato de UEA mastras la Asocion (Statuta art.29); la Estraro respondecas al la Komitato, sed havas vastajn devojn kaj rajtojn (art.33); komisionoj povas ekzisti kun kontrolpovoj, sed ne kun decidrajtoj (art.39). La CO ne aperas en la decidofara ĉeno.

Efektivigo de decidoj: Praktike ne eblas tiel organizi okdekonojn da komitatanoj dise en la tuta mondo, ke ili kapablas elaste kaj rapide reagi al ŝanĝigantaj situacioj. Kiam ili kunsidas unu fojon jare, ili devas dependi de la konsiloj kaj rekomendoj de la Estraro, komisionoj kaj unuopuloj sen provi funde kompreni kaj trakti la kolosan papermonton, kiu frontas ilin. Ĉiuj komunikoj dum la cetero de la jaro devas okazi poŝte, do tre peze.

La Estraro povas sekvi la evoluon de aferoj multe pli bone ol la tuta Komitato (i.a., la Estraro kunsidas trifoje jare), sed la instanco, kiu ĉiam estas la plej informita kaj ĝisdata estas la CO. Sekve, oni tre atentigas la konsilojn de la ĜD, sed ĉi tiu ne havas la decidofaran povon de la Estraro.

En lastaj jaroj okazis anomalio en la decidofara strukturo en tio, ke la prezidanto de la plej grava, plej influhava kaj plej ofte kunsidanta komisiono, la Komisiono pri Financo kaj Administrado (KFA), estis samtempe Prezidanto de UEA. KFA montriĝis esti disputiga komisiono (du el ĝiaj anoj demisiis el ĝi pro malakordo!); ĝi havas vastan respondecon, kiel proponado de buĝetoj al la Estraro; kiel ni jam rimarkis supre, komisiono principe havas kontrolpovon, sed ne decidrajton. Kiam buĝetpropono aŭ similaĵo venas al la Estraro kun rekomendo de KFA, la Estraro emas konsulti sian propran fakulon pri financo kaj sekvi ties konsilon. Tiu fakulo estas la sama, kiu faris la rekomendon en KFA; sekve, la Estraro malemas plenumi sian funkcion de kontrolo de proponoj kaj rekomendas akcepton al la Komitato... kiun prezidas la sama persono!

Mi menciis alian situacion, kiu reliefigas la funkcion de la Estraro en la taga efektivigo de decidoj. Laŭ la Kongresa Regularo, la Estraro devas aprobi ĉiun membron de LKK. Laŭ aparta regulo, nur la ĜD kaj Direktoro de la CO el inter la oficistoj rajtas sendi proponon al la Estraro por voĉdonado. Sekve, se LKK decidas nomi novan anon, ĝi komunikas tion al la KKS (kiu normale konas ĉiujn membrojn de la LKK); KKS devas siavice proponi al la estrarano pri kongresoj (la koncerna fakulo kun la rajto proponi); tiu subskribas proponilon kaj resendas ĝin al la CO por distribuo al la tuta Estraro, kiu devas skribi voĉdoni nur ene de pluraj semajnoj. Ofte estrarano neniel konas la koncernan homon, do tiu devas akcepti la implican rekomendon de la KKS, malgraŭ ke estrara decido eksplicite malpermesas al la KKS mem proponi al la Estraro.

(La daŭrigo troviĝas sur paĝo 128)

Etoso pridancinda ĉe Eo-festivalo en Svedio

Sepdeko da gajaj junuloj viciĝis en la antaŭteatra korto por fotiĝi. Aldoniĝis akordiono, iĝis dancvico. Por pluraj ne sufiĉis la korto; dancrondo eksportis la Esperantan kanzonarton promene laŭ la apudaj stratoj, je la miro de la pentekoston celebrantaj upsalaĵoj. Jam okazis la oficiala fermo de la unua Kultura Esperanta Festivalo (KEF), sed neniu volis foriri. Tio atestas la intiman kaj bonan etoson de tiu tritaga novaĵo.

La etoso fontis unue el perfekta ejo – bone ekipita pupteatrejo kaj kafejo, kiun precize plenigis la pli-oldek-nacia publiko. Ĝin helpis la idilia sved-maja vetero. Ĝin nutris senmakula kaj kreiva organiza lerto, ĉiam preciza sen esti peza. Ĝin kompletigis mirinda programa amplekso kaj vario, kiun ni povis ĝui sen paralelaj aranĝoj aŭ hastosento.

Pupteatro: La slovaka pupteatraro Tomáš Plaszký dufoje mirigis nin per sia kapablo bildigi komplikajn rakontojn per kreiva uzo de malmultaj rekvizitoj. Li prezentis *Straŝaŝiro* kaj *Janĉjo Pizeto* (vd. la foton).

Ankaŭ Ivica Špoljarec ĝuis du okazojn imponi nin per sia imagpovo; per la elstara son- kaj lumbilda prezentaĵo *Dudek sep*, kaj per la profesinivele deklamita monodramo *Por ĉiu bona vort'*.

Ankaŭ dufoje surpodiĝis Stefan MacGill por prezenti skeĉojn kun iom da movada kaj primonda satiro. La pli koncizaj eroj estis plej bone akceptitaj.

Pro la mallongeco de la festivalo eblis nur unu studrondo. Ĝiajn du sesiojn gvidis Giorgio Silfer kaj

Foto: Marianna Plaszková

Perla Martineli, kiuj skizis la evoluon de la kultura gazeto *Norda prismo* en ĝia pli larĝa movada kunteksto.

Avangardaĵoj: Avangardo karakterizis plurajn el la eroj. Tiel impresis – eĉ post duafoja spektado – la unuakta dramo *Cikonioj* pri infanmemoroj de mensmalsanulo, laŭ enscenigo de Kooperativo Verda Monto el Jelenia Góra (Pollando). Nepre avangarda estis la poezia prezentaĵo de Jarl Hammarberg, kiu uzis la vorton kun ĝia sono kaj ne la frazon kun ĝia signifo kiel la komunikilon. Pli ortodokse digestebla estis la poezio de Leif Gunnar Nordenstorm, kies afekciaj kvalitoj bone sentiĝis en "Al teroristo" kaj "Malfermu vin".

Muziko: La plej forta artbranĉo estis la muzika. Nova talento malkovriĝis, eĉ por svedoj, en la formo de Torbjörn Engström, kiu ĉepiane tranĉvoĉe socikritikis: "Vere mirinde, ĉu ne?", kaj "Letero al la prapatroj". Lia blusa kaj motaŭna stiloj unikas en Esperanto. La sola iom komparebla movadano estas la kaliforniano Briĉjo Burg.

El Hungario vojaĝis József Dinnyés (sur la foto) por lanĉi sian novan kaseton *Al venko!* La titolo estas tiu de la poemo de Baghy. Melodiĝis ankaŭ "La diversaj aĝoj de l' homo" de Schwartz, "Perlamoto" de Ito Saburo, "Vane" de L. Cornelis Deij kaj pluraj verkoj de Dinnyés mem en tradukoj de Imre Szabó.

La rokmuzika grupo Amplifiki, ĉi-foje konsistante el Kim Hendriksen, Martin Wiese kaj Bertil Wennergren, prezentis sian konatan repertuaron kaj aldonis unu por la okazo verkitan laŭd-kanton omaĝe al la festivalo kaj ĝia unika etoso: do ne nur "Kafo kaj te", sed ankaŭ pri la Kultura Esperanto-Festivalo (KEF). Permesu al mi proponi taŭgan titolon por eventuala nova festivala varb-kanto: "Kafo, te' kaj KEF-iro".

Speciale por KEF formiĝis la rokmuzika grupo "Persone", kun Bertil kaj Martin el "Amplifiki" (tamburare kaj basgitaro respektive), akompanataj de Per-Ola Axelsson (saksofono) kaj Börje Lund (gvid-gitaro). La grupo eksplode prezentis sin per decibela kresĉendo verŝajne neniam enmovade superota ĝis nia ducentjara jubileo! Ili ekspluatis la idealajn kondiĉojn por entuziasmi la KEF-antojn, kiuj rifuzis pasive sorbi koncerton sed tuj ekdancis. "Persone" bone kombinis viglon kun muzika disciplino kaj talento. Inter iliaj banan-balistikaj ekscesoj, ni ricevis etimologian edukon: "Pizang" signifas bananon, kontrolu mem en *PIV*; sen tiu scio, sensenca viv'!".

La ĉiam populara Gianfranco Molle memorigis nin pri sia pionira rolo en la kanzonarto per kronologia retrospektivo, ĉerpanta el la okjara *La vojo*, el



Sceno el la pupteatraĵo Janĉjo Pizeto, unu el la 2 prezentadoj de la slovaka pupteatraro Tomáš Plaszký.

Kontakto kaj aliaj, por fini per antaŭgusto de la sekva kaseto, *Forveli*, per "La kanzono de la atendado" kaj "La marvirino".

Publikeco: Pri la festivalo aperis duonpaĝa artikolo kun foto en la plej granda sveda vesperĵurnalo *Expressen* (517 mil ekzempleroj), aldone al novaĵoj en lokaj ĵurnaloj kaj radio-stacio.

Kiam en la ferma sesio lunde la popolo plurope pledis por KEF-ripeto, la vizaĝoj de la ĵus dankitaj organizantoj ne tuj brilis pro ĝojo fronti denove tian taskegon. Sed plenfide, ke entuziasmo revenos post forpaso de laco, ili akceptis okazigi duan KEF en Lund en 1988. Post du jaroj (de lundo al Lundo!), ili esperas ebligi al artistoj ne nur prezenti erojn, sed kunlabori en praktikaj sesioj por surloke krei art-verkojn.

Stefan MacGill

INFORMADO

Kion vortoj elvokas kaj kion ili devus elvoki

Ĉar Detlev Blanke atribuas al mi (*Esperanto*, marto 1986, p.46-47) opiniojn, kiujn mi ne havas kaj neniam esprimis, mi estas devigita atentigi pri liaj miskomprenoj. Anstataŭ pritrakti lian artikolon detale, mi invitas la interesitojn kritike legi mian tekston (*Esperanto*, dec. 1985, p.209-211) kaj kompari ĝin kun la asertoj de Blanke. Post rimarkigo, ke mia teksto koncernis informadon al la ĝenerala publiko, dum Blanke parolas nur pri fakuloj – ĉe kiuj, kompreneble, vortoj ne naskas similajn elvokaĵojn – mi ĉi tie limigos min je tri ekzemploj:

1) Blanke atribuas al mi rekomendon propagandi malveron (rilate al la socia naturo de lingvo). Mi neniam proponis ion similan. Respekti la veron estas, miaopinie, la sola maniero efiki en informado. Lingvo estas socia fenomeno, kaj nenie mi diris, ke tion oni kaŝu. Mi simple rekomendis, ke oni havu komprenon kaj respekton ankaŭ al tiuj, kiuj sentas lingvon simila al io vivanta, ĉar temas pri natura metaforo plene pravigebla (oni relegu la koncernan parton de mia artikolo), kaj krome utila al Esperanto, se oni uzas ĝin en la spirito, kiun mi indikis.

2) La frazo de Blanke: "La nocioj "plani" kaj "plano" tute ne devas elvoki sentojn pri io burokrata, senhoma" bele ekzempligas, kiom li miskomprenis min. Mi parolis pri faktoj – tio, kion vortoj elvokas – ne pri idealo – tio, kion vortoj devus elvoki. Fakto estas, ke, en la limigita teritorio, kie mi esploris (mi tre precize evitis ĝeneraligi en mia artikolo), la vorto "planlingvo" elvokas ĉe la plimulto ion burokratan,

nehoman, tro intelektan kaj ne sufiĉe respektan al sentoj, por ke planlingvo aperu simpatia. Pri tiaj faktoj mi esploris multjare. Ke mia esplorado rilate al la opinioj pri Esperanto havas seriozetan valoron, tion eble atestas la decido, farita de pariza universitato, publikigi raporton mian pri ĝi (Piron, C., *Espéranto: l'image et la réalité* (Esperanto: la imago kaj la realo), Parizo: Université de Paris VIII, 1986; 76 paĝoj).

Oni ne povas informi sen komuniki. Sed komunikado okazas nur se en la menso de la alparolato formiĝas kompreno simila al tiu de la parolanto. En latinidlingvaj landoj, se oni parolas pri planlingvo, oni ne elvokas ion similan al tio, kio Esperanto estas por esperantisto: komunikado ne okazas. Kontraste, miaj esploroj montris, ke se oni diras "konvencia lingvo", oni tie evitas tujan negativan reagon, kaj ke la mesaĝo pli bone transdoniĝas.

3) Mi volonte jesas al la peto de Blanke "akcepti, ke lingvo ne estas nur instrumento de poetoj". Esperanto, feliĉe, uzeblas en scienco, komerco, politiko, ĉiutaga vivo kaj ĉiaspecaj konkretaj kaj intelektaj kampoj. Kie li ĉerpis, ke mi tion neas? Sed lingvo ebligas ankaŭ aliri la vivon laŭ alia perspektivo, senta poezia, fantazia. Estas grave konsideri ankaŭ tiun aspekton en nia informado – kaj en la elvoka efiko de niaj vortoj – ĉar ĝi estas por multaj la kriterio, kiu ebligas distingi senvivan lingvaĵon, ekzemple komputilan, disde lingvo plene homa.

Konklude, mi rekomendas preni en konsideron, en nia informa laboro, la pravajn aspektojn de la biologia metaforo pri lingvo kaj la poezian flankon de lingva esprimado. El tio dedukti, ke lingvo por mi ne estas socia fenomeno aŭ estas nur instrumento de poetoj, estas neĝuste kaj nejuste. Krome kredigi, ke mi rekomendas mensogi en nia informado, danĝere proksimiĝus al misfamigo, se ne temus, evidente, pri grandega miskompreno.

Claude Piron

INTERLINGVISTIKO

Abundo da prelegoj

La 14a Scienca Interlingvistika Simpozio okazis de la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo en Ośrodek Szkoleniowy "Caritas" en Nadarzyn, apud Varsovio. Kompare kun la simpozio de la antaŭaj jaroj, la instituto por arbarkulturo, ĝi estis nepre pliboniĝo, ĉar ĝi havas pli belan ĉirkaŭaĵon. Ni trafis belan printempan veteron, ni ĝuis precipe la ĝuste tiam florantajn ĉerizarbojn.

La simpozio ne suferis pro maljuniĝo. Estis proksimume 40 partoprenantoj, el kiuj 15 mem prele-

gis. La prelegoj estis: "Esperanto en la neesperantlingva fikcia literaturo" de Claude Nourmont, "Zamenhof kaj Eliezer Ben Yehuda, la kaŭzoj de iliaj (relativaj) sukcesoj kiel lingvo-vivigantoj" de Willem Verloren van Themaat, "Religiaj kredoj de la knabo el Bjelostoko" de Tadeusz Michalski, "La esprimo de nelaŭsangaj parencaj rilatoj" de Balasz Szemök, "Rimarkoj pri evoluo de kemia nomenklaturado en naciaj lingvoj kaj Esperanto" de Andrzej Warszawski, "Pri la bezono konstati la gramatikan karakteron de la Esperantaj radikoj" de Ryszard Rokicki, "Heterogena karaktero de la Esperanta leksiko" de Antoni Golonka, "Sciobank-teknologio kaj la semantika mekanismo de DLT" de Toon Witkam, "Komuniko pri esploroj de Esperantaj vortaroj" de Antoni Golonka, "Interdependo de verbo kaj aktanto" de Didi Weidmann, "Tradicio kaj literaturhistoriaj procezoj de Esperanto" de Wojciech Usakiewicz, "Revolucio de la kvalito" de Géza Felső, "Esperanto, ĉu aŭtonomia lingvo" de Brian Moon, "La lingvo mem kiel atestanto pri Zamenhofaj kon-

vinkoj" de Tomasz Bedyński, "Pri la uzado de komputilreto en Esperanto" de Willy Henli, "La raŭmismo" de Sándor Révész, "Esperantologio – pri skriba aŭ preskriba scienco?" de Ryszard Rokicki.

La simpozio ne estis tiel dediĉita al la persono de Zamenhof kiel estis planite. El la diskuttemoj estis plej interesaj – traktitaj en pluraj prelegoj – la uzado de Esperanto en komputiloj kaj la strategio de la Esperanto-movado. Felső kritikis en la nuna Esperanto-movado troajn movadocentrismon kaj desuprismon.

En la vesperoj okazis kulturaj aranĝoj. London estis prezentita *Amo – sopiro – espero* de Jerzy Fornal, kompilaĵo el la verkoj de Zamenhof. Mardon estis prezentitaj diapozitivoj pri la antaŭa Scienca Interlingvistika Simpozio kaj vojaĝo tra Alĝerio de Brian Moon. Merkredon Esperantyna Mirska voĉlegis siajn poemojn, parte porinfanajn. Min ili ĉarmis per sia sonludo, sed aliaj malpli entuziasmis. Ĵaŭdon oni vizitis la tombon de Zamenhof.

W.A. Verloren van Themaat

INSTRUADO

IEI vige profesiigas la Cseh-instruadon

La nunaj monatoj de 1986 estas agadplena periodo por Internacia Esperanto-Instituto (IEI), origine Cseh-Instituto de Esperanto, kies sidejo situas en Hago (Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando).

Dum la 71a Universala Kongreso de Esperanto, en Pekino, okazos Cseh-metoda kurso por komencantoj, gvidata de s-ino Éva Farkas (Hungario), kaj

enkonduka seminario por estontaj Cseh-instruistoj, gvidata de s-ino Irena Szanser (Pollando). Sed plue, dum la tuta monato aŭgusto, disvolviĝos en Pollando du Cseh-metodaj kursoj kaj kvar Cseh-metodaj seminarioj sub gvidado de s-ino Audrey Childs-Mee (Nederlando); kaj jam okazis en julio, en La Chaux-de-Fonds (Svislando), Cseh-kurso kaj enkonduka seminario.

Tiuj kursoj kaj seminarioj finiĝos, sed ne la agado de IEI. Krom organizado de similaj okazaĵoj, daŭras ankaŭ la detala reviziado de la gvidlibro por kursgvindantoj: *La kurso de Andreo Cseh*. Ĉi tiu materialo, avangarda antaŭ pli ol kvindek jaroj, dume malnoviĝis, kio rezultigis juĝojn, ke la metodo fariĝis malmoderna. Sed tio montras nur, ke la esperantistaro erare miksis du malsamajn nociojn – la metodon kaj la materialon. La metodo, kiu estas baze rekta metodo, kiun delonge aplikadas multaj el la plej sukcesaj komercaj lernejoj de naciaj lingvoj, neniam malmoderniĝos. Aliflanke, instrumaterialo, t.e. la vortprovizo, ekzemploj, situacioj ks., jes malaktualiĝas. La reviziado de la originala materialo rilatas ĉefe al aktualigo de ĉi tiuj eroj. La plene reviziita *Cseh-kurso* aperos en nova vesto frue en 1987, la Jubilea Jaro.

Per sia agado IEI, kunlaboranta asocio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, celas ne nur ree disvastigi la aplikadon de Cseh-metoda instruado en la mondaj Esperanto-kursejoj, sed ankaŭ kontribui al la profesiigo de Esperanto-instruado ĉie en la



Audrey Childs-Mee prezentas diplomon al ano de Ĉe-kurso en Międzygórze, Pollando, en aŭgusto 1985.

mondo, forviŝi el la reputacio de tiu instruado la makulon de fuŝa amatoreco.

La instrumentado de Andreo Cseh de antaŭ sesdeko da jaroj denove kaptas la intereson de esperantistoj. Pro tio IEI aktuale disvolvas planon por konatigi la Cseh-metodon kiel eble plej vaste en la movado kaj ebligi al taŭgaj interesitoj fariĝi diplomitaj Cseh-instruistoj. Ne ĉiuj, eĉ jam sukcesaj kursgvidantoj kaj profesiaj lingvo-instruistoj, taŭgas por fariĝi Cseh-instruistoj. Tiun fakton malkovras studantoj de la enkonduka seminario. Kelkaj trovas, ke tia instruado postulas kvalitojn, kiujn ili aŭ ne havas aŭ ne emas ekspluati; kelkaj konstatas, ke ilia propra lingvoscio malsufiĉas por la tasko. Ili perdas neniom per partopreno en la seminario, lernas multon utiligeblan ankaŭ en alispeca instruado kaj ekscias pri propraj mankoj kaj fortoj en la lingvouzo.

Al tiuj, kiuj deziras daŭrigi la studadon por fariĝi diplomitaj Cseh-instruistoj, IEI ofertas du pliajn seminariojn. Ĉiu seminario en la tri-ŝtupa serio daŭras dudek kvin horojn. Inter la unuopaj seminarioj la studantoj praktikas la teknikon de la metodo kaj plibonigas sian propran lingvoscion per legado, studado, verkado ks. La tuta seminari-serio, kun intervaloj, daŭras du jarojn.

Seminario A – la enkonduka: La instituto invitas al partopreno en la enkonduka seminario ĉiun flue parolantan esperantiston, kiu interesiĝas pri instrumentadoj. Partoprenantoj lernas pri la historio de la metodo, pri la specialaĵoj de la Cseh-kurso, kiuj diferencigas ĝin de ĉiuj aliaj rektmetodaj lingvokursoj, kaj pri la tekniko de rektmetoda lingvo-instruado ĝenerale.

Fine de la A-seminario studantoj demonstras sian komprenon de la metodo per kvinminutaj prezentaĵoj.

Seminario B – la pliprofundiga: Dum la dua seminario la partoprenantoj profundigas en la metodon kaj materialon, esploras Esperanto-kulturon, vastigas sian konon de la movado kaj studas la instruotan lingvaĵon laŭ pedagogia kaj metodika vidpunktoj.

Fine de la B-seminario studantoj plenumas kontrol-taskon, kies enhavo estas parte metodika, parte lingva. Ĝiaj rezultoj indikas, kiuj estas kompetentaj pluiri kaj kiuj bezonas pli funde studi la lingvon.

Inter la B- kaj C-seminarioj la instruisto-kandidatoj gvidas tutan kurson laŭ la Cseh-metodo kaj pri la kurso sendas detalan raporton al IEI por sin kvalifiki kiel partoprenantojn en la C-seminario.

Seminario C – la diplomiga: La programo de la C-seminario konsistas el du ĉefaj partoj:

1) interŝanĝo de, kaj diskuto pri, spertoj dum kursgvidado, eventuale kun konsilo kiel solvi spertitajn problemojn; prezentado de aliaj materialoj utiligeblaj dum instruado kaj legaĵoj rekomendindaj al la kursanoj,

2) elmontrado de kompetento: diplomig-kandidatoj prezentas antaŭ juĝkomisiono mallongan lecionon Cseh-metodan. Tiuj, kiuj kontentigas la komisionon pri sia instrukapablo, estos agnoskitaj de IEI kiel plenrajtaj Cseh-instruistoj, kaj ricevos atestatan diplomon.

Instruado laŭ Cseh-metodo estas specialaĵo en la pli vasta kampo de instruado. Trejnante estontajn Cseh-instruistojn, IEI celas produkti ne universitatajn profesorojn pri lingvistiko, sed klerajn esperantistojn, kiuj, kompreninte la gramatikon kaj strukturon de Esperanto kaj flue parolante la lingvon, deziras disvastigi ĝin per agrabla kaj efika instruado.

En la lando, kie antaŭ cent jaroj naskiĝis la Internacia Lingvo, kvalifikiĝos novaj specialistoj pri la metodo instrui ĝin internacie. Post diplomiga seminario en Gdańsk, la unua taĉmento de Cseh-instruistoj, trejnitaj ĝis profesia nivelo de kompetento, sin prezentos al la jubilejara Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio.

Audrey Childs-Mee

38a IFEF-KONGRESO

Fervojistoj allogis 700 kongresi en Makedonio

El dek ok eŭropaj landoj kolektiĝis fervojistoj en Skopje (Jugoslavio) por la 38a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), kiu okazis de la 17a ĝis la 23a de majo. Estis pli ol 700 partoprenantoj, el kiuj pli ol duono venis el Jugoslavio.

Kunlaboro kun Interfrigo

La faka ĉeftemo estis la komunaj aktivadoj de eŭropaj fervojoj por certigi fidindan transportadon de facile putremaj varoj helpe de la tiucele fondita




societo Interfrigo. Membroj de tiu societo estas preskaŭ ĉiuj eŭropaj kaj kelkaj ekstereŭropaj fervojoj. Gvozden Sredić, kunordiga konsilanto pri kontenera trafiko kaj fervoja transporto de facile putremaj varoj ĉe Unuiĝo de Jugoslavaj Fervojoj (JŽ) en Beogrado, originale verkis en klara lingvaĵo koncizan traktaĵon pri la temo. Interfrigo disponigis taŭgajn ilustraĵojn kaj certigis la presadon de la *belaspekta broŝuro*, kiun ĉiu kongresano trovis inter siaj pape-roj. La prelego mem estis libera parolado akompane al koloraj lumbildoj, elokvente kaj atentokapte prezentita de s-ro Sredić. En la sekva vigla diskutado nenia detalo de la demandoj restis sen respondo aŭ klarigo. Poste la aŭskultintoj fiere portis la emblemon de Interfrigo – flugantan bluan neĝeron – sur insignoj, disdonitaj ĉe la salonpordo. (Interesitoj povas peti la broŝuron de: JAFE, Pf.563, YU-11001 Beograd, Jugoslavio.)

Diverslandaj aktualaĵoj

Dua faka agado estis la ĉiujara programero "Aktualaĵoj el diversaj landoj", ĉi-foje kun sep kontribuoj: El Francio venis bildraporto pri la konstruado de nova fervojlinio por grandrapidaj trajnoj (TGV) de Parizo al Atlantiko. El Nederlando oni prezentis lumbildojn pri speciala feriotrajno por biciklistoj, veturanta al Francio. Aŭstrio montris kiel oni povas telefoni ankaŭ el internaciaj trajnoj per valorkartoj, sen uzi monerojn. FR Germanio invitis dumnokte vojaĝi kuŝante en kupeoj por unu ĝis ok personoj. El Norvegio venis peto helpi ĉe la tradukado de gvidbroŝuro pri la fervoja muzeo Hamar surbaze de la Esperanta teksto en pliajn naciajn lingvojn. Pri la ĵus realigita ligo de la fervoja reto en Albanio kun tiu de Jugoslavio per la nova linio Titograd – Shkodër prezentiĝis interesaj bildoj. Fine Pollando prezentis sian fervojan ĉeflinion inter Silezio kaj la havenoj ĉe Golfo de Gdańsk. Tiu tuta paletro de aktualaj informoj fervojaj vekis grandan intereson ĉe la kongresanoj.

Terminara Komisiono

La Terminara Komisiono de IFEF trifoje kunsidis. Konstatinte la faritajn laborojn pri la tradukado de la seslingva fervojfaka terminaro, eldonota de Internacia Fervoj-Unio (UIC), oni diskutis la teknikan proceduron prespretigi helpe de komputilo en Hispanio la manuskripton por la Esperanta traduko. Sekvis diskutoj pri unuopaj terminoj, pri kies tradukoj estas ankoraŭ malsamaj opinioj. Okaze de la Centjara Jubileo de Esperanto, IFEF volas presigi la tradukojn de la unuaj tri aŭ kvar literoj alfabetaj kaj oferti la kajereton dum la 39a IFEF-kongreso en Katowice (Pollando). Tiujn agadojn laŭdis la estro de la loka fervoj-direkcio de Skopje, A. Varnaliev, okaze de oficiala akcepto por kongresa delegacio, al



Horo kantas en la inaŭguro de la 38a kongreso de fervojistaj esperantistoj en Skopje, (Jugoslavio).

kiu apartenis ankaŭ la fervoj-direkcia estro de Katowice, A. Rodak, gastigonto de la venontjara IFEF-kongreso.

El la organizaj kunsidoj menciindas la reelekto de la ĝisnuna estraro de IFEF (Giessner, Engen, Rösemann, Hauge, Olsen). Inĝ. István Gulyás estas konfirmita en sia ofico kiel UEA-komitatano A. La kotizo restas senŝanĝa. Josip Zupanić (Jugoslavio) estis nomita honora membro de IFEF, kaj Gvozden Sredić ricevis oran medalon de la neesperantista Internacia Federacio de Kulturflegantaj Fervojistoj (FISAIC) pere de ties reprezentanto Gustav Hutmacher (Svislando). Kongrespropono pri aranĝo de forumo, kiu celos reciprokan utiligon de spertoj el diverslandaj movadaj atingoj, estis akceptita.

Distraj kaj amuzaj programeroj abundis dum la semajno: interkona vespero, baleda vespero, festa komuna manĝo antaŭ balo, folkloro vespero, aŭtobusa rondveturo kaj promenado tra la urbo post inaŭguro de strato "Esperanto", ekskursoj al arkeologia elfosejo, vinkulturejo kaj lago.

La Loka Kongresa Komitato estas gratulinda kaj dankinda, ke ĝi sukcesis venki preskaŭ ĉiujn problemojn kaj altgrade kontentigi la bezonojn kaj dezirojn de la kongresanoj.

Gernot Ritterspach

UEA-kodo Skribante al la Centra Oficejo de UEA, bonvolu ĉiam menciigi vian "uea-kodon". Tiel via peto estos pli rapide traktebla, ĉar serĉado de informoj, kontado, skribado de leteroj ktp. plej ofte okazas per tiu komputila kodo, kiu estas al vi unika. La kodo konsistas el kvar literoj, streketo kaj kvina litero (ekz. abcd-e), trovebla supre dekstre sur la adres-etikedo de via revukoverta. Dankon!

Daŭrigo de la artikolo "La Centra Oficejo kaj UEA sub lupeo", de sur p.122:

Sen tiu peza proceduro nomo de nova LKK-ano ne povas aperi en la Kongresa Libro.

La du antaŭaj alineoj celas reliefigi la problemon, ke UEA kelkrilate estas organizaĵo sen sufiĉe da kontroloj, kelkrilate kun tro da ili. Kiel trovi ekvilibron?

Resume, ni vidas, ke UEA havas konsiderindajn problemojn akiri sufiĉajn taŭgajn oficistojn; ĝi ne sukcesas provizi sufiĉe bonajn laborlokojn aŭ laborilojn; ĝi havas iom pezan, senekvilibrantan decidofaran strukturon... kaj mi eĉ ne menciis la financajn problemojn de la Asocio! Sufiĉas diri, ke se oni dungus tiom da homoj, kiom estas vakaj postenoj, la kosto de la salajroj certigus eĉ pli grandan negativan ciferon en la fino de la bilanco.

Solvoj?

Ĉi tiu sekcio de la artikolo diferencas de la antaŭa parto en tio, ke problemoj estas faktoj, sed proponoj pri solvoj estas hipotezaj. Malgraŭ tio, miaj proponoj baziĝas sur fundamento de realismo, ĉerpita el la sperto de la problemoj. Ekzemple, mi nepre ne intencas aserti: "UEA devas trovi pli da bonaj oficistoj". Mi nun scias, ke tio ne okazos kaj ke la kosto estas aktuale neeltenebla.

Oficistaj funkcioj: Ni konsideru la situacion ekvacie. Estas kvar variantoj: laboro farinda (L), oficistoj por fari ĝin (O), la kosto de tiu farinda laboro (K) kaj la rimedoj por pagi tiun koston (R). Ideale, $L = O$ kaj $K = R$. Reale, $L > O$ kaj $K > R$.

Mi jam notis, ke estas malfacile pligrandigi la nombron da oficistoj, eĉ sen pensi pri la financa kromfiko. Ni nun konsideru la financan aspekton. Ĝenerale, la oficistoj, kiuj laboras en la CO, ne kreas rimedojn por UEA, sed konsumas ilin. Escepto estas la libroservo. Ĉu KKS kreas rimedojn, estas dubinde – almenaŭ oni povas aserti, ke la Universalaj Kongresoj estas valorega servo kaj bonega propagando por la Asocio je minimuma kosto. Kun tiuj esceptoj, la aktualaj oficistaj taskoj apenaŭ povas grave altigi la enspezojn.

Sistemigo de laboro: Sed L devas egali al O kaj K al R. Se ni ne povas pligrandigi O kaj R en la nuna situacio, ni devas redukti L kaj, sekve, K. Kompreneble, L estas aŭtomate limigita, se mankas homoj por fari atendantan laboron, sed la tendenco estas tute sensisteme limigi ilin. Mia unua propono, do, estas: *UEA konstante taksu kiom da laboro estas farebla kaj difinu la prioritatojn por fari ĝin.*

Mi jam aludis al la oficistoj, kiuj frontas nemastreblan kvanton da taskoj; la tendenco estas fari tiujn, kiuj estas plej interesaj, plej facilaj aŭ farindaj laŭ diversaj similaj kriterioj. Sed devus esti la asocia politiko, ne persona emo, kiu diktas kion fari.

Ĉu vi deziras ekzemplon de la speco de prioritato al kiu mi aludas? Bone. Mi foje ŝerce asertis, ke pro troa laborpremo mi intencas prokrasti la venontan Kongreson; sed la dato estis, kompreneble, neŝanĝebla. Simile neŝanĝebla devus esti la dato de apero de ĉi tiu revuo. [Red. Konsentite!]

Por efektivigi tiun proponon, UEA bezonas establi administran mekanismon, kiu fiksus metodon de taksado kaj kontrolado. La Komitato povus postuli tion; la Estraro povus rutine superrigardi la situacion; la ĜD povus havi la taskon, kunlabore kun la direktoroj de la oficejoj, prizorgi la ekvilibriĝon de idealismo kaj realismo. La fina rezulto povus esti, ke oficistoj ĉesas labori ĝis elĉerpiĝo, ĉar ĉiu tago havos difinitan kvanton da farebla laboro, post kiu ili iros hejmen.

Kreskigo de rimedoj: De kiam UEA estos tiusence en stabila situacio, estos tempo plani kiel kreski. Se reveni al mia antaŭa ekvacio, tio eblos nur se $R > K$, t.e. ni devos kreskigi niajn rimedojn aŭ redukti niajn kostojn. Konsideri kiel redukti kostojn estas pli-malpli konstanta agado de KFA, sed mi proponas, ke *UEA havu pozitivan politikon pri evoluigo de komerca agado.*

Mi jam menciis la nesukcesan provon establi turisman servon. Malgraŭ tio, ni ne ĉesu celi al ĝi. Mi jam menciis la mankon de eldonisto. Ni nepre strebu pleniĝi tiun vakuum. La libroservo povus vendi pli da varoj ol nun okazas. Ekzistas merkato en aliaj asocioj por bazaraĵoj (kravatoj, T-ĉemizoj, salut-kartoj, leterpapero ks.), kiun ni povus pli komerce sondi. Dumkongrese ni jam foje ekspluatas kelkajn fontojn de gajno (filatelaĵojn ks., sen paroli pri kanada acersiro!). Ni pli emfazu tiun aspekton de la kongresoj kaj strebu, ekzemple, akiri monopolon de la restoraciaj servoj. Ni jam enspezas iom da mono per vendado de uzitaj poŝtmarkoj, sed lasas la taskon en la manoj de la jam menciita, tro ŝarĝita, elstara komitatano. Mi mencias tiajn ŝajne bagatelajn ekzemplojn por montri, ke ni regule neglektas eblecojn por celkonscia komerca agado pro manko de pozitiva politiko ĉi-rilate almenaŭ tiom multe, kiom pro manko de tiucela oficisto.

Laboro devas esti limigita ĝis ekvilibriĝo – rimedoj devas esti kreskigitaj por atingi plian evoluon.

Kromaj proponoj: Miaj sekvaj komentoj estas malpli fundamentaj, sed traktas punktojn jam reliefigitajn kiel problemojn. La unua koncernas la komputilon.

Mi proponas, ke *UEA turnu sin al komercaj komputil-kompanioj aŭ aliaj specialistoj por inviti prezofertojn pri taŭga sistemo*, prizorgota de la vendisto surbaze de kontrakto simila al jam ekzistantaj prizorgo-kontraktoj ĉe la CO.

Kiam oni instalas la nunan sistemon, oni komencis krei propran, originalan programaron. Kvankam la siatempa moninvesto estis relative tre malalta por la

ricevitaj maŝinaro kaj programaro, ekde tiam ambaŭ kostis kaj daŭre kostas apenaŭ takseblan kvanton da laboro kaj tempo por programado kaj prizorgado. Neniu oficisto scipovas plene ekspluati la eblecojn de la komputilo pro manko de instruado kaj bona manlibro. La origina argumento, ke neniu komerca programaro povas respondi al la specifaj postuloj de UEA sufiĉe malalte koste, verŝajne nun perdis sian validecon, kondiĉe, ke UEA pretas adapti kelkajn siajn rutinojn al la havebla programaro.

Mia fina propono estas relative malgrava, sed havas simbolan signifon por la rolo de la CO en la decidofara ĉeno. La CO estas kutime plej bone informita pri ĉio en la movado. Indas rekoni tion por pli efika decidofarado. Mi do proponas, ke *la Ĝenerala Direktoro havu voĉdonrajton en la Estraro*.

Ĝis nun mi emfazis realismon en miaj proponoj; kontraste, miaj finaj vortoj entenu iom da revado.

Post kelkaj jaroj eblos taksu la rezulton de la grandega investo en la Domo de UEA. Se la valoro sufiĉe altiĝos, mi esperas, ke oni remalfermos la dosieron pri nova loko por la CO. Negrave, ĉu ĝi estu en prestiĝa internacia urbo aŭ en malalte kosta urbeto, ĝi ne restu en Roterdamo, kiu donas la avantaĝojn nek de unu ekstremo nek de la alia.

Fina punkto: se, per pli bona organiziteco, ni povas unue stabiligi la financon kaj poste atingi kreskon, kiel ni uzu niajn ekstrajn rimedojn? Laŭ mi, ne indos simple presi pli da propagandiloj kaj esperi pri kresko de la membraro por pravigi tion. Ni investu por poste gajni eĉ pli: ni ofertu salajrojn, kiuj ebligas dungon de komerce orientitaj oficistoj. Se tiuj ne estas troveblaj en Esperantujo, ni varbu ekstere – ekzistas precedencoj. Tiuj homoj pagu sian propran salajron kaj donu ion kroman al la Asocio per efika enspeziga agado. Tio estas la vojo antaŭen.


Diccon Masterman

LINGVO KAJ KULTURO

Frazeologiaj sintagmoj en la Internacia Lingvo

Tute hazarde ĵus venis en miajn manojn la n-ro 1/1986 de *Bulgara esperantisto*, kie mi havis okazon legi interesan artikolon de Ljubomir Miĥajlov, nome: "La frazeologiaj esprimoj kaj Esperanto". Mi volas aparte gratuli la aŭtoron pro tiel klara kaj kompetenta pritrakto.

Sed dum ĝia legado ŝoketis min kelkaj asertoj de Miĥajlov, nome: "Esperanto-etno ne ekzistas", "Esperanta kulturo ankaŭ ne ekzistas", "Eĉ kiam oni verkas originale en Esperanto, ankaŭ tiuj verkoj apartenas al la etna kulturo de ties aŭtoro, tiel kiel, ekzemple, la verko en angla lingvo de hindo aŭ en portugala de angolano ne estas eroj de la angla aŭ portugala, sed de la hinda aŭ angola kulturo."



Stafeto-libro estas frazeologia sintagmo: praktike netradukebla esprimo, apartenanta al aparta kulturo. Ni ĉiuj apartenas al la homaro, do estas nature, ke ano de nacia kulturo samtempe estu ano de internacia kulturo. Kial provi forklarigi la Esperantan kulturon, kvazaŭ ekzistus konflikto de interesoj?

Laŭ mia kompreno kaj laŭ tiu de la socia etnologio, etnon konsistigas, ĉefe, tri fundamentaj eroj, nome: lingvo, ideologio, institucioj. Aliaj trajtoj, kiujn oni ordinare ligas al etno, la t.n. materiaj trajtoj, t.e. la antropologiaj, demografiaj, ekonomiaj ktp., ja gravas, sed ne tiel medole decide kiel la t.n. kulturaj karakteriziloj. Nu, ĉu al Esperantujo mankas lingvo, ideologio, institucioj? Mi firme opinias, ke Esperantujo havas tiujn tri fundamentajn konsistigilojn de etno. Ni ekzemplu per la juda etno, kiu tranaĝis du mil jarojn, ĝuste tial, ke ĝi havas kaj lingvon kaj ideologion kaj instituciojn. Ne gravas, ke tiun etnon konsistigas negroj, flavuloj, indianoj kaj ĉefe blankuloj; ne gravas, ke dum du mil jaroj ĝi ne havis – kiel ĝi ne havas nun – antropologian unuecon, propran geografian teritorion, ekonomian sistemon ktp.: ja gravis – kaj plu gravas – la hebrea lingvo, la juda ideologio, la tradiciaj institucioj. Simile okazas ĉe la centjara etno Esperantujo.

Mi ne konsentas, ke se hindo aŭ angolano verkas en la angla aŭ en la portugala lingvoj, iliaj verkoj apartenas al la hinda aŭ al la angola kulturoj. Tio ja okazas, sed ne ĉiam ekskluzive. Ĉu la kulture usoniĝinta hispano Santayana, ĉu Guimerà (naskiĝinta en la hispanlingvaj Kanarioj kaj nur 19-jara irinta al Katalunio) apartenas al la hispanlingva kulturo? Ĉu Nabokov, kiu same eminente verkis unue en la rusa kaj poste en la angla apartenas ekskluzive al la rusa kulturo? Ĉu Madariaga apartenas aŭ al la angla aŭ al la hispana kulturo, ĉar li egale majstris la anglan kaj la hispanan lingvojn kaj komuniis ĉi ties ambaŭ lingvotradiciojn? La patrujo, ĉefe la kultura patrujo – la plej aŭtentika –, ne ĉiam necese koincidas kun tiu de la

etno, en kiu oni naskiĝis. Laŭ mia vidmaniero, mal-kongruus aserti, ke Conrad apartenas al la pola kulturo, Zamenhof al la rusa kaj pola kulturoj, Santayana kaj Guimerà al la hispana, Canetti al la bulgara, Kafka al la ĉeha, Nabokov ekskluzive al la rusa, Madariaga ekskluzive al la hispana. Ili ĉiuj verkis en lingvoj de kulturoj *adoptitaj*, kaj ili fariĝis elstaraj verkistoj de tiuj kulturoj. Forigi ilin el la kadroj de la kulturoj, kiujn ili adoptis, signifus perforti la realon de iliaj plej aŭtentikaj etnoj, kiujn ili ĝiskerne alprenis.

Mi kulturas en du etnoj: la hispana kaj la Esperanta. Mi ne scias, ĉu oni povas plenkompreni traduki en la bulgaran lingvon la sintagmon "*samideana* amiko" kun la kunsignifoj, kiujn la vorto *samideana* levas en Esperantujo; en la hispanan mi ne kapablas, ĉar nenio en la hispana povas redoni la "Esperantolingvan kontrakton", kiun empirie spertas ĉiu normala esperantisto. Kiel, facile, gracie, paroli pri la "*verdisma* ideologio" de multaj samideanoj kaj elvoki la saman "lingvan kontrakton", kiun *verdisma* havas en nia kulturhistorio? Kiel senpeze transdoni ekster-Esperanten la kunindikojn, la akompanajn signifojn de nia "*interna* ideo"? Ĉu *Esperantujo*, malgraŭ la repuŝo, kiun ĝia uzado provokas ĉe kelkaj pintuloj de la movado, ne estas, jes ja, unu el niaj aŭtoktonaj, indiĝenaj idiotismoj? Ĉu *movado* ne estas semantika idiomaĵo en frazoj kiel la ŝajne nelogika sed Esperante tute klara "ni devas savi la movadon de stagnado kaj inercio"? Kiel trakti la verbon *krokodili*, kies Esperantan etimologion neniu, laŭ mia scio, ĝis nun konvinke klarigis, kaj tial ĝi aperas en nia kulturo kvazaŭ spontanaĵo egala al tiu de multaj vortoj en aliaj etnolingvoj? Kion diri pri *kabei*, pri *blinkenbergoj*, pri "*zamenhofeca*, *kaloĉajeca*, *ŝvarceca* dirmanieroj"? Mi povus plilongigi la liston, ekz. per "*neŭtralisma* sinteno", "*sennacieca* spirito", "*eterna komencanto*", "*ĝisostulo*", "*talpa* laboro", "*delegita* reto", "*Fundamento* de Esperanto", "*verdstelaj* salutoj", *Stafeto*-libroj, "*ĝis (la)*" ktp. Multaj *um*-vortoj elvokas nuancojn apenaŭ redoneblajn per alietnaj senparafrataj ekvivalentoj: iam okazis vigla polemikado sur la paĝoj de *Sennaciulo* (alia Esperanta idiomaĵo!) por kaj kontraŭ la uzado de la mallongigo *k* en presaĵoj de Sennacieca Asocio Tutmonda anstataŭ la plena *kaj*; fine unu el la intervenintoj proponis ĉesigi tiun *kajumadon* kaj reveni al pli ordinaraĵoj temoj... Aliajn ekzemplojn mi povus aldoni, sed espereble tiuj specimenoj sufiĉos por montri, ke ankaŭ Esperanto posedas proprajn frazeologiaĵojn, estigitajn de ties memstara *kultura* tradicio. Sen tiu kapablo krei stereotipajn sintagmojn; sen tiuj esprimoj, kiuj ne estas proprasence disanalizeblaj (t.e. per aglutino de iliaj konsistaj signiferoj), sed bloke signifantaj; sen tiuj kliŝlingvaĵoj, kiuj ankoraŭ apenaŭ rolas belliterature, sed en kiuj jam burĝone

spiras kaj ekaromas la poezio, Esperanto, kiel *lingvo*, ja dronintus ĉe siaj unuaj elpaŝoj, kiel, ĝis nun, dronis ĉiuj aliaj pli-malpli *logikaj* internacilingvaj intencoj kaj projektoj. Resume kaj alivorte: se inte ne estus tiel, la zamenhofa artfaraĵo Esperanto neniam intus vivanta lingvo.

Juan Régulo

Recenzoj

Enhave digna omaĝo al Gaston Waringhien


Li kaj ni; Festlibro por la 80a naskiĝtago de Gaston Waringhien, red. Reinhard Haupenthal (1945). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1985. 520p. Ilus. 22cm. ISBN 90 6336 034 7. Prezo: 66,00 gld.

Kun kvarjara malfruiĝo post la vivojubileo de la Esperanta enciklopediisto Gaston Waringhien, dek tri jarojn post lia *Ni kaj ĝi*, aperis kolekto de kontribuoj por "Li" de 27-foje "ni" (la 28a, Annakris Szimkat verŝajne estas pseŭdonimo de la redaktoro). Ĉi tiu sukcesis kunmeti riĉan bukedon. Li mem, Marjorie Boulton (poeme) kaj Roger Bernard prezentas la multfacetan kaj por la evolu(ig)o de Esperanto tiel kreivan vivon de la jubileulo. William Auld analizas la "kulturarkivon" *La nica literatura revuo*, pri kies redaktoro, Gaston Waringhien, prezentas siajn rememorojn la eldoninto Raymond Fiquet. Gaston Waringhien, la eseiston, prezentas F. de Diego, la tradukiston Clelia Conterno (m.1984) kaj Kathleen Hall, la leksikologon John Wells kaj du pseŭdonimojn de Waringhien (G.E. Maŭra, G. Peterido Penter) analizas Michel Duc Goninaz. D.B. Gregor kritikas la tradukon de *Eneido* (1906) fare de Vallienne. Matuba Kikunobu traktas pri originalpoemaj hajkoj kaj utaoj. Henri Vatré vortstatistike prilumas aŭtorajn stilapartaĵojn, ankaŭ tiujn de Waringhien. Wilhelm Wingen (m.1983) prezentas itismajn formojn el la Zamenhofa traduko de *Fabeloj* de Andersen, kompare kun la germana tradukolingva bazo. Marjorie Boulton ofertas tre interesan studon pri nomenklature de koloroj. Skrupulege Kawasaki Naokazu elplukas diferenc(et)ojn inter la kvin eldonoj de *Marta*, kaj N.C. Maimon surprizas per la aserto, ke la ŝatokupo (tiele!) de Zamenhof estis la... hilelismo-homaranismo. Traktas pri fonemaj opozicioj en Esperanto Max Mangold, pri signo-signifo-problemoj István Szerdahelyi kaj pri determinado Fabrizio Pennacchietti. La skiza studo de Tazio Carlevaro pri mondlingvaj akademioj bedaŭrinde malhavas ĉapitron pri Akademio de Esperanto, kies prezidanto

dum longa tempo estis Waringhien. Ĝuste pri la taskoj, funkciado kaj perspektivo de la lingva institucio de Esperanto urĝe necesas rezonadi. Peter Forster sociologias pri la Ido-skismo, kaj Bernard Golden trovas volapukan influon en la ĝermanaj elementoj de Esperanto. Stojan Ĝuĝev diskutas estetikajn problemojn en interlingvistiko, bedaŭrinde kontraŭ *Plena ilustrita vortaro*, nome "sinĥrone" kaj "diaĥrone", tamen donante interesajn vidpunktojn pri la lingvistike apenaŭ akceptebla estetikumado pri lingvoj. Dokumentojn pri kaj de Zamenhof prezentas Juan Régulo kaj iu mistera A. Szimkat. La meritplena redaktoro aldonas al siaj bonegaj volapukologiaj studoj plian, nome pri Schleyer. Interesa estas la ampleksega eseo de André Albault pri alfabetoj (inkluzive la Esperantan) kaj preseblecoj, kvankam ĝenas tro da apostrofoj, kontraŭfundamenta *w* (p.116) en *westo* (= okcidento), la superflua *eosto* (= oriento), *Cirilla* (p.116) anstataŭ "cirila", *Hella* (p.115) anstataŭ "helena", *Lituanio* (p.117) anstataŭ "Litovio": makuloj, kiujn oni ne atendus de la prezidanto de la Akademio.

Komplete katastrofa, kvazaŭ dorno en la bukedo, estas la somnambula *Evoluo de Esperanto* de Karolo Piĉ, kiu ĵonglas per bombastaĵoj senenhavaj kaj laŭ kiu la bedaŭrinda lingvo de Zamenhof disponas pri magiaĵoj kiel i.a. "absoluta strukturo, perfekta arte-

La silueto de Gaston Waringhien sur la kovrilo de la festlibro Li kaj ni. Lia influo en nia literaturo kaj lingvo estas apenaŭ kalkulebla.



fariteco, absoluta skemo, maksimuma simpla, universala kombineblo, centprocenta konstanteco, senekzempla unikeco" ktp. Ni krome ekscias en la neologisme mania lingvaĵo de Piĉ, ke "Esperanto ne evoluas... eĉ ne povas evolui" (p.290) kaj ke "Esperanto senĉese abrupte evoluas" kaj "tamen tute ne ŝanĝiĝas" (p.292). Komprenu, kiu povas.

Reinhard Haupenthal kaj Henri Vatré unuafoje enlistigis (ĉiujn?) publikaĵojn de la jubileulo. Sekvas tre malsamdetalaj priaŭtoraj notoj. Mankas indeksoj pri personoj kaj temoj. Ne estas klara la ekesto de la "Tabula Gratulatoria" (tabelo de la gratulantoj), kie enestas nekontribuintoj kaj mankas alie gratulintoj.

Entute enhave kaj amplekse tre digna omaĝo al enhave kaj amplekse tre digna enciklopedia kultivanto de la Zamenhofa lingvo.

Detlev Blanke (Germana DR)

Nesukcesa provo trovi la logikon en Esperanto

Pledo por unueca lingvo, Rikardo Ŝulco (Richard Schulz, 1906). Paderborn: Esperanto-Centro, 1985. 287p. 21cm. Bind. ISBN 3 922570 42 9. Prezo: 55,80 gld.

Ĉi tiun libron mi ne rekomendas. Legi ĝin certe vin ne damaĝos, sed vi estu avertita, ke ĝi estas ekstreme teda kaj malplaĉe demagogia.

Temas pri kolekto de lamentoj pro la koruptita stato de la nuna (kaj ankaŭ pli frua) Esperanto. Fakte la lingvaĵo de la aŭtoro mem ne multe diferencas de la kutima Esperanta stilo kaj legiĝas tute glate (ĝis oni tediĝas pro la ripetado de ĉiam samaj temoj). Des pli energie li klopodas konvinki nin, ke en la lingvaĵo de aliaj svarmas eraroj, kiel ekzemple la vortoj "lambastono" kaj "grandurbo". Oni ne rajtas diri "li estas tiel granda kiel mi", nek "tia bela kongreso", nek "mi ne sciis, ĉu li havas leteron por mi" (sed oni rajtas diri "mi demandis, ĉu li havas leteron por mi"!).

La aŭtoro starigas sendube gravan demandon: ĉu "korekteco" en Esperanto dependas de "logiko" aŭ "konvencio". Sed dum aliaj diskutas pri la ĝusta ekvilibro inter la du kriterioj, Ŝulco agnoskas nur logikon. Eĉ tute kutima Esperanta esprimo povas laŭ li esti erara, en absoluta senco, se ĝi kontraŭas la logikon – ion universalan kaj kristale klaran, kiu sin revelaciis unue al Luis Mimó kaj poste al Ŝulco. Tiu logiko cetere ne malhelpas al la ĉi-lastaj uzi la esprimon "iomege ofte" aŭ ne kompreni la diferencon inter la nedifinaj "unu" kaj "iu", facile esprimeblan en logiko.

Ni bezonas diskuton pri la disvolvado de nia lingvo. Mi tute ne kredas, ke kritikaj voĉoj, kiel tiu de Ŝulco, devas esti mutigitaj. Sed, se iu pledas por nekutimaj formoj kaj esprimoj, anatemante la pli tradiciajn, li ne nomu tion "Pledo por unueca lingvo". Tio estas pura demagogio: se vi akceptas *miajn* proponojn, ekregos unueco; nur la aliaj kulpas pri la nuna diverseco.


Fine mi ankaŭ avertu, ke kvankam temas pri libro preskaŭ 300-paĝa, la enhavo estas malriĉa. La ĉefa temo estas la misfama participa problemo, en kiu la aŭtoro subtenas la t.n. atismon. Li ne sukcesas diri ion novan – kiel multaj antaŭ li, inkluzive de itistoj, Ŝulco nenion scias pri lingvistikaj teorioj de tempo kaj aspekto. Senskrupule li nomas sian temposistemon "Zamenhofa", kvankam li devas perforte reinterpreti kelkajn Zamenhofajn frazojn kaj deklari aliajn "erarojn". En la cetero de la libro la aŭtoro ludas la amuzan ludon "esperantigo de ĉiuj propraj nomoj". "Perlino Martinelio" kaj "Karlo Stojbovico" rekoneblas ankaŭ en sia nova vesto. Sed nur por "Ŝulco" mem tia ludo estas serioza afero.

Jouko Lindstedt

Principoj tro maŝinaj

Principoj por elekto de matematikaj kaj stokastikaj terminoj en Esperanto, Olav Reiersøl. Oslo: Universitato de Oslo, 1985. 40p. 30cm. ISBN 82 553 0583 1. Prezo: 12,00 gld.

Estas ĝojige, ke Olav Reiersøl, emerita profesoro ĉe Universitato de Oslo kaj respondeculo pri multaj matematikaj kaj stokastikaj terminoj en *Plena ilus-*



Ĉiu bezonas ja ĉie la matematikon!

trita vortaro, prezentas en facile legebla formo kelkajn el la ideoj, kiujn li sekvas en la scienca vortfarado.

Ĉefa parto de la multenhava kajero estas ĉapitro, kie la aŭtoro starigas du principojn por "racia elekto de bazaj vortoj kaj radikokategorioj". Aplikante la regulojn en la praktika vortfarado, li malakceptas, kiel nelogikajn, plurajn esprimojn formitajn el fundamentaj aŭ oficialaj vortelementoj, por anstataŭigi ilin per novaj.

La principoj ŝajne taŭgus en scienco virga, kie ankoraŭ ne ekzistas Esperanta terminologio, sed en malnova kampo kiel kelkaj partoj de la matematiko, oni laŭ la opinio de la recenzanto devus apliki ilin nur konsidere de aliaj gravaj principoj, ekz. la vortfarada sistemo kaj la fundamenta vortprovizo. Kial ne akcepti la adjektivan karakteron de plej oftaj radikoj kiel *grand'*, *long'*, *alt'*? Kial ne akcepti la verban karakteron de la oficiala radiko *distribu'*?

En pluraj kazoj la aŭtoro ne akceptas terminon, ĉar ĝi ne estas sufiĉe logika. Ĝenerale, li ofte pravas. Sed kelkfoje la manko de logiko estas tiel eta, ke ĝi neniel ĝenas la komprenon. En kelkaj kazoj mi eĉ ne povas sekvi la rezonadon, ekz. kiam la aŭtoro kritikas kiel misgvidan la adjektivon *integrebla*, kiun mi komprenas kiel "kiun oni povas integri".

Resume, do, la principoj de la aŭtoro estas uzataj kvazaŭ maŝinoj por enkonduko de novaj radikoj

(kelkfoje dezirindaj, kelkfoje ne bezonataj laŭ la recenzanto), neniam por sarko, kaj sekvas, ke ili supersarĝas la lingvon. Tiaj maŝinoj kompreneble povus esti pli danĝeraj ol enkonduko de unuopaj terminoj. Cetere la matematiko ja estas scienco, kie tradicie oni uzas ne la klerajn vortojn, sed tre simplajn kun modifitaj signifoj. Estu dirite, ke la tuta verkaro de Reiersøl tamen sendube multon kontribuis al pli logika kaj strikta terminelekto.

Valora superrigardo de kelkaj matematikaj terminaroj finas la kajeron. La enkondukinto de la necesa kaj jam bone enradikiĝinta matematika adjektivo "finia" donis al ni gravan konsultlibron.

Christer Kiselman (Svedio)

Atentokapta, emociiga rakonto pri Balio

Amo kaj morto en Balio (1937), Vicki Baum (1888-1960). El la germana trad. P.H. Mooij. Roterdamo: UEA: 1986. 420p. 21cm. ISBN 92 9017 033 6. Prezo: 28,50 gld.

Lastatempe la libroproduktado en nia movado fariĝis gratulinde pli profesie arta, kaj ankaŭ tiu ĉi volumo estas aspekte tre alloga. Ĝi estas ankaŭ longa, kaj aĉetinto ricevas multe da legaĵo kontraŭ sia investo. Pro la amplekso de la libro, la historio povas disvastiĝi malhaste, kaj la leganto profunde konatiĝas kun personaro kaj medio ekzotikaj por la plimulto el ni. Temas pri la vivo ĉefe de indiĝenoj en la nederlanda kolonio Balio dum la komencaj jaroj de la nuna jarcento. Unuavide tiuj balianoj loĝas en speco de paradizo, kun abunda manĝaĵo kaj multe da libera tempo por siaj sportoj kaj distraĵoj. Muziko kaj danco ludas gravan rolon en la socio, kaj perturbas nur la maloftaj perfortaĵoj de la naturo, kiel invado de ratoj en la rizokampoj.

Sed ne estas tiel simple. La socio estas samtempe feŭda kaj kasta, kaj kapricoj de princoj kaj ministroj povas ĉiumomente malagrabligi la vivon de kamparanoj. Ekzistas ankaŭ la Granda Malsano – la lepro; kaj ekzistas ankaŭ la blankuloj, kies blankula justeco kapablas en la fino alporti katastrofon kaj maljustecon. La rakonto estas atentokapta kaj emociiga.

Priskribo pri medio tiel fremda postulas sufiĉe grandan apartan vortprovizon por nomi specialaĵojn de la regiono kaj de la vivmedio. Komence tio iom ĝenis min, sed mi baldaŭ kutimiĝis, kaj cetere ekmemoris, ke finfine Esperanto ne estu lingvo eŭropa sed tutmonda. En tiu ĉi kunteksto baliaj radikoj estu bonvenaj. La teksto legiĝas flue kaj korekte, kaj tamen pri unu afero mi miras. Ĉu la tradukinto neniam laŭtlegis al si (aŭ aliaj)? Mi volas diri: kiel oni elparolas

ekzemple jenon: "Sarna portis la malgrandan Siang'n, kaj Rantung penportis Klepon'n, kiu estis grasa kaj peza" (p.221)? Kial oni ne kuraĝe esperantigas tiajn nomojn, precipe en verkoj fikciaj? El ĉiu alia vidpunkto mi tre ĝuis la libron.

William Auld (Skotlando)

Germana romantikismo

Tri noveloj, J. von Eichendorff (1788-1857). El la germana trad. R. Haupenthal. Würzburg: Eichendorff-Gesellschaft, 1985. 184p. 15cm. ISBN 90 6336 035 5. Prezo: 33,00 gld.

La romantikismo estas idealisma ĝenro sufiĉe klare fortranĉita de realo. La idealizitaj kavaliroj kaj damoj bele amas kaj bele mortas. Temas pri nobelaro, speco de kokoj en la socia kokinejo. Estas tiu sociklaso kiu eltrovis "amon", ĉar nur ĝi sufiĉe riĉis por disponi pri libera tempo por okupiĝi pri tia frivolo. Samo direblas pri "honoro".

Von Eichendorff estis precipe poeto. Liaj noveloj spegulas tion, kaj la traduko de Haupenthal bone redonas tiun poeziecon. Inter kelkaj feliĉaj trovaĵoj: *kajole-petole; skuas kaj detruas; rap, rap, rapide!; rig, rig, rigardu!*. Ne temas pri epokfara verko, sed ĝi estas bona enkonduko en la germanan romantikismon. Sed atentu: ĉi tiu verko estas tradukita en avangarda dialekto de Esperanto.

Rikardo Cash (Francio)

Arto de la mistera fino

La vualo de l' tempo, J.H. Sullivan (1913). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1985. 116p. 22cm. ISBN 90 6336 028 2. Prezo: 19,50 gld.

Kun la kutime altnivela grafika prezento, TK/Stafeto liveras al ni entute dudek novelojn originale verkitajn de J.H. Sullivan. En ili rolas la propra stilo de Sullivan, kiu sukcesis esprimi sin per ekvilibre riĉa, klara kaj flua lingvaĵo, kaj precipe la ĝenerala etoso. Iom pli nebula, ekzemple, ol en la "kameraaj" rakontoj de Golden, tiu duondifiniteco rilatas kaj la protagonistojn kaj la scenejojn de la noveloj kaj foje ankaŭ ĉi ties temojn mem.

Krom du-tri nekutimaj vortoj (*kinefotilo, skuvi-briĝi, bonordo*) kaj malgraŭ ripeta uzo de *proksima* anstataŭ "venonta", la lingvaĵo estas tute senriproĉa, kun tre interesaj parolturnoj, kiel la uzo de slanga *neĝo* (heroino) aŭ la frazo *iri ien alian*.

Enestas ĉiaj rakontoj: kvazaŭ moralinstruaj, pseŭdofatalaj, duonsciencfikciaj, verŝajne humuraj kaj eĉ mistereskaj..., sed la plej trompa trajto estas la fino de ĉiu novelo: ne gravas, ĉu vi atendas, esperas, deziras ĝin roza, feliĉa, ĉu nigra, peĉa, literature sadisma: vi neniam trafos. Ja foje eĉ ne fino estas! Legu la verkon.

Georgo Camacho (Hispanio)

Kalendaro

Ĉi tiu kalendaro ne inkluzivas la aranĝojn, menciitajn en la marta numero.

Aŭgusto

- 01-30 Int. laborbrigado de Jugoslavia Esp-ista Junulara Asocio, Mostar, Jugoslavio (JEJA, V. Pelagiĉa 8/I, YU-71000 Sarajevo)
- 04-16 Cseh-seminarioj + kurso por komencantoj, Bydgoszcz, Pollando (IEI, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando)
- 09-18 6a Int. Esp-ista Turista Marŝo, Montaro Pirin, Bulgario (Kiril Hlebarov, ul. G. Delĉev 8, BG-2850 Petriĉ)
- 11-21 Junulara biciklado, Germana DR (R. Schindler, Bardelebenstr. 5, DDR-1200 Frankfurt/O.)
- 16-23 Somera Esp-ista Familia Tendaro, Thomsdorf, Germana DR (W. Pfennig, Leibnizstr. 5/67, DDR-2000 Neubrandenburg)
- 16-29 5a Int. Feriado "Esperanto hejme", Międzygórze, Pollando (PEA, Skrytka 16, PL-50-952 Wrocław 17)
- 18-30 Cseh-seminarioj + kurso por komencantoj, Międzygórze, Pollando (IEI, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando)
- 30-07 sept. Renkontiĝo de naturamikoj, vegetaranoj kaj joganoj, Dudince, Ĉeĥoslovakio (E. Váňa, CS-962 71 Dudince)

Septembro

- 01 Internacia Tago de la Paco
- 01-14 22a Int. Esp-ista Feriado "Ora pola aŭtuno", Międzygórze, Pollando (PEA, Skrytka 16, PL-50-952 Wrocław 17)
- 01-09 Turisma Esp-ista Feriado, Montaro Rodopi, Bulgario (Eo-Societo "Kulturo", Pk.30, BG-4702 Smoljan)
- 15-20 Turisma Esp-ista Mara Renkontiĝo, Nesebar, Bulgario (Okraŝno Rakovodstvo na Bes, Pk.303, BG-8000 Burgas)
- 20-27 Promenoj/ekskursoj al Windermere ks., Morecambe, Britio (Hotelo Esperanto, 2 Oxcliffe Road, Heysham, Morecambe, LA3 1PS)

Oktobro

- 03-05 Semajno de Kvakera Esp-ista Ligo, Morecambe, Britio (S-ino S. Phillips, 23 Milward Road, Hastings, TN34 3RP)
- 10-12 Socia semajnfino, Morecambe, Britio (vd. 20-27 sept.)
- 10-12 10-jara jubileo de Eo-Societo de Südharz, Herzberg, FR Germanio (Eo-Societo, Grubenhagenstr. 8, D-3420 Herzberg am Harz)
- 24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj
- 24-26 Beletra semajnfino kun Marjorie Boulton, Morecambe, Britio (vd. 20-27 sept.)
- 31-02 nov. 22a Kataluna Kongreso de Eo, Lleida, Hispanio (Sek. de KEA, Apartat 290, Sabadell-Barcelona)

Decembro

- 10 Tago de la Homaj Rajtoj
- 15 Zamenhof-Tago/Tago de la Esperanta Libro
- 27-03 jan. 30a Int. Seminario de Germana Eo-Junularo, Kolonjo, FR Germanio (T. Pusch, Am Schwertberge 23, D-2845 Damme)

Alta akvo, La, István Nemere (1944). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1985. 129p. 20cm. ISBN 963 571 159 X. Romano pri la timo, de unu el la plej produktivaj verkantoj de originala Esperanta literatura prozo. Prezo: 15,00 gld.

Elektitaj fabeloj, Jakob kaj Wilhelm Grimm. El la germana trad. (1906) Kabe (Kazimierz Bein). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1985 (2a fotorepreso de la unua eld.). 6+199p. 19cm. Bind. Jubilea Eldonserio: 2 Beletro tradukita 10. Fama fabelkolekto de la Fratoj Grimm en la klasika traduko. Prezo: 33,90 gld.

Esperanta konversacio 1, Li Shijun (Laŭlum, 1923). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 6+184p. 15cm. Laŭteme dividita gvidilo de frazoj kaj vortoj en Esperanto kaj la ĉina por konversacio de komencantoj. Prezo: 5,10 gld.

Esperanto kaj literaturo (1979), Valo (pseŭd.). Laroque Timbaut: Laŭte!, 1986 (represo). 18p. 21cm. SAT-Broŝurservo. Artikolo el *Sennacieca revuo*, kun konsiloj por verkemuloj. Prezo: 1,50 gld.

Esperanto-movado en Ĉinio, Hou Zhiping (1937). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 164+28p. Ilus. 19cm. Ĉinlingva historio kun 28 paĝoj da nigra-blankaj fotoj. Prezo: 8,10 guldenoj.

Generalo Bananan; Unuakta komika opereto (1924), Miyazawa Kenzi (1896-1932). El la japana trad. Takesita Tokio (ps. Bam Buo, 1913). Numazu: Biblioteko Kolombo, 1983. 39p. Kolorbildo, muziknotoj. 20cm. Unu el malmultaj dramoj de elstara fabelverkisto, pri la senutilo de la milito, kun porprezentaj indikoj. Prezo: 10,50 gld.

Helpilo por lernado de Esperanto. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 8+264p. 19cm. Gramatikaj esploroj, analizoj k.a. por ĉinlingvaj lernantoj, tute en la ĉina. Prezo: 9,90 gld.

Kavo (1943), Ivan Goran Kovačić (1913). El la kroata trad. Božidar Vančik. Varaždin (Jugoslavio): Esperanto-societo, 1985. 30p. 20cm. Dek kantaĵoj, verkitaj en sesversaj strofoj, pri la suferoj de martiro: "krio de libero kaj espero"; kun antaŭparolo kaj komentario. Prezo: 7,50 gld.

Kio estas Esperanto? / Ni zhidaao shijieyu ma? Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 6+119p. 19cm. Ĉinlingva informlibro pri la Internacia Lingvo. Prezo: 4,50 gld.

Lernolibro de Esperanto / Shijieyu jiaocheng, Wei Yuanshu k.a. Ŝanhajo: Ŝanhaja Fremdlingva Eduka Eldonejo, 1985. 2+357p. Tridek-leciona lernolibro, aparte por la studado de Esperanto kiel dua, nedevisa lingvo en ĉina altlernejo; kun Esperanta-ĉina vortlisto kaj ŝlosilo al ekzercoj. Prezo: 11,70 guldenoj.

Magia peniko, Han Ŝing. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 40p. (nenumeritaj). Kolorilus. de Li Ŝigji. 21cm. Fabelo pri peniko, kies pentraĵoj iĝas vivaj. Prezo: 3,00 guldenoj.



Malgranda monografio pri Esperantaj prepozicioj (1936-39), Ossaka Kenĵi (Ossaka Kenzi, 1888-1969). El la japana trad. Zhou Li. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 6+109p.

19cm. Ĉinlingva studo pri prepozicioj por lernantoj de Esperanto; adaptita el *La revuo orienta*. Prezo: 5,10 gld.

Malnovaj rakontoj en la urbo Ŭakajama (1982), komp. Kôsaka Zyrô, Itô Takahumi, Ibaragi Atumi. El la japana trad. Tanaka Masami, Hatanaka Hiroshi, Egawa Harukuni. Wakayama: Ŭakajama-Triopo, 1985. 105p. Ilus. de Iwaki Hisa. 26cm. Dudek tri rakontoj el la japana urbo Wakayama. Prezo: 13,50 gld.

Moderna mito: La kolektiveco, Gilbert R. Ledon. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda, 1986. 107p. 21cm. Ampleksa originala eseo pri aspektoj de la kolektiveco. Prezo: 16,50 gld.

Noveloj, Henryk Sienkiewicz (1846-1916). El la pola trad. (1925) Lidia Zamenhof (1904-1942). Varsovio: Eldon-Kleriga Centro Ritmo, 1985 (represo de la eld. de 1925). 2+65p. 18cm. ISBN 83 7013 011 9. Ses noveloj de la fama pola Nobel-premiito; kun enkonduko de Andrzej Pettyn. Prezo: 3,90 gld.



Verso kaj larmo; Elektitaj poemoj, Eli Urbanová (1922). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1986. 87p. 21cm. Jubilea Eldonserio: 1 Beletro originala 8. La tria originala poemaro de la aŭtorino en Esperanto, kun novaj poemoj kaj elektitaj represoj el ŝiaj pli fruaj poemaroj. Prezo: 15,00 gld.

Volapük oder Weltsprache (1884), Arthur Näther. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1985 (represo). Jubilea Eldonserio: 4 Interlinguistik 5. 2+12p. 21cm. Prelego "Volapuko aŭ mondlingvo"; kun postparolo de R. Haupenthal (tute germanlingva). Prezo: 4,50 gld.

Diversaĵoj:

Insigno "Jubilea simbolo". Ronda kun la jubilea simbolo (blanka) sur helverda fono, kun surprisita duona simbolo (malhelverda); 37mm. Broĉo. Prezo: 1,20 gld.

Ludi kaj lerni; Kartoj por lingvoekzerco, Malte Markheden. Skatolo kun 56 kartoj kun nigra-blankaj desegnaĵoj kaj tajpitaj surskriboj; kun ludinstrukcioj. Prezo: 5,70 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

● **Brazilo:** Fundação (fondaĵo) Getulio Vargas estas internacie konata institucio, konsistanta el diversaj institutoj kaj superaj lernejoj sur la kampo de administrado, ekonomiko, edukado, psikologio kaj aliaj branĉoj de la sociaj sciencoj. Dank' al apogo de Asocio de Oficistoj de la fondaĵo, okazas Esperanto-kurso por 15 oficistoj kaj aliaj. Nun okazas informkampanjo por allogi lernontojn.

● **Bulgario:** De la 24a ĝis la 28a de majo la urbo Vraca estis gastiganto de kelkaj Esperanto-aranĝoj kadre de la naciaj kulturaj festoj "Botev-tagaj '86": Sesa Internacia Konkurso-Recitalo pri Botev kaj Bulgara Poezio en Esperanto, Internacia Esperanto-Konferenco "La internaciismo de de Ĥristo botev kaj nia nuntempo" kaj Konsultiĝo de a ĉefredaktoroj de la Esperanto-gazetaro el socialismaj landoj, kies temo esitis "Esperanto-gazetaro kaj pacmovado". Partoprenis 200 esperantistoj el Belgio, Bulgario, Germana DR, Hungario, Mozambiko kaj Pollando.

● **Japanio:** Kun japanlingva surskribo memore al la 71a Universala Kongreso en Pekino, Oomoto eldonigis por la anoj de sia Esperanto-Amikaro telefonkarton kune kun la Esperantaj vortoj "Mi subtenas/ne parolas Esperanton". La karto estas uzebla por aŭtomataj telefonvokoj nur ene de Japanio.

● **Jugoslavio:** La nova prospekto *Jugoslaviaj Fervojoj prezentas sin*, kiu mencias ankaŭ la socian agadon de la esperantistoj, estas senpage mendebla de: JAFE (ZJŽ), Pf.563, YU-11001 Beograd, Jugoslavio.

● Alia menciinda fervojista novaĵo el Jugoslavio estas la 30-jara jubileo de *Jugoslavia fervojisto*, la oficiala organo de Jugoslavia Asocio de Fervojistaj Esperantistoj. Ĝi estas la plej longviva Esperanto-organo el sia lando.

● **Kubo:** La eldonejo "José Martí", subordigita al la kuba Ministerio pri Kulturo, jam eldonis (1984) en Esperanto la verkon de Fidel Castro *La historio absoluta min*. En la baldaŭa estonteco aperos *Kuba ŝtata organizo* de Domingo García Cárdenas (p.144), *La lasta virino...* de Manuel Cofiño, novelo, kiu gajnis la premion "Domo de Amerikoj" en 1971,

Trankvilo blanka de Enrique Cirules kaj *En marŝo kun Fidel* de Antonio Núñez Jiménez.

● **Germana DR:** Laŭ fidinda fonto, ni ricevis la informon, ke Germana Demokratia Respubliko eldonos poŝtmarkon en 1987 honore al la Centjara Jubileo de Esperanto.

● **Malto:** La Esperanto-klubo en Liceo Vassalli, Tal-Handaq, komencis eldoni sian propran lernejan revueton, *Nova fajrero*, kiu jam atingis sian kvaran numeron. La klubo volonte ricevas korespondaĵojn kaj pretas interŝanĝi sian eldonaĵon kontraŭ alilandaj: A. Mercieca, Klubo Tutmonda Amikeco, Liceo Vassalli, Tal-Handaq, Malto.

● **Nikaragvo:** Nikaragva Esperanto-Asocio (Apartado 3912, Managua) estas unu el la plej junaj landaj Esperanto-organizaĵoj en la mondo. Kiel oni povas imagi, ĝi nuntempe spertas grandajn malfacilojn. Ni citas el antaŭ nelonge ricevita letero: "Sed mankas al ni helpo... por la tuta Esperanto-movado. Pro tio ni havas multajn... bezonojn: ... materialojn por instrui, mimeografon

por presi nian bultenon, paperon, skribmaŝinon, monon por pagi ĉambron..., tiu ĉi estas nur sonĝo. Ĝis nun tute la kostoj de nia movado estis pagataj de [ni], ĉar la plejparto de niaj gelernantoj ne laboras. Multaj knaboj devas iri en la militon, kaj la Esperanto-movado estas plejparte formita el virinoj kaj kelkaj maljunuloj. Nia situacio ekonomie estas tre malsupera, nia mono estas tre malvalora rilate al la dolaro..." La asocio volonte akceptas ĉiajn Esperanto-materialojn. Eventualajn mondonacojn oni prefere sendu al la konto de la nikaragva asocio ĉe UEA (UEA-konto: neax-o).

● **Ruando:** La 1-an de junio fondiĝis esperantista grupo en la universitata urbo Butare de la centrafika ŝtato Ruando. La grupo konsistas, krom unu escepto, el lernantoj en Esperanto-kurso, kiu komenciĝis en aprilo. La provizora estraro de la grupo estas Gatete Frédéric (agronomia inĝeniero, prezidanto), Wim de Smet (universitata profesoro el Belgio, vicprez.) kaj Niybizi Jean-Damscène (lingvo-instruisto, sekretario-kasisto). Oni povas esti simpatianta membro de la grupo per pago de 500 ruandaj frankoj (ĉ. 250 belgaj frankoj aŭ 25 guldenoj). Pagojn akceptas Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk-lei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Foto: Mimi Edreva



● **Bulgario:** Komence de aprilo okazis la 1a Intensa Kurso de Esperanto por komencantoj, organizita de Instrua Komisiono de Bulgara Esperantista Asocio (BEA), kun helpo de la lokaj esperantistoj en Jambol. La kurson, kiun gvidis Marin Bacev (kun kravato) kune kun instruistinoj Cvetana Kostova kaj Anka Angelova, oni evoluigas al aparta instrumentado. Dum naŭ labortagoj oni instruis po naŭ horojn tage, post kio dek unu kursanoj sukcesis en la ekzameno. BEA pagis la elspezojn de la instruistoj.

(UEA-konto: fela-x). Ĉiaj sendoj de Esperantaj materialoj estos bonvenaj: Esperanto-Grupo, p/a W.M.A. De Smet, Dept. Biologie, Univers. Nat. Rwanda, B.P. 117, Butare, Ruando.

● **Togo:** Unuafoje la vorto Esperanto estis menciita de la nacia radioservo de la okcident-afrika lando Togo, Radio Lomé. Temas pri scikonkurso, kiu ĉiudimanĉe distras la toganojn. La 25an de majo la lasta demando estis: "Kiel nomiĝas la lingvo internacia, kreita de la polo Ludoviko Zamenhof (1859-1917), rekonita de UN kiel proksimigilo de popoloj?" Neniu el la konkursanoj povis respondi, do la programestro donis la respondon. La demandon proponis al la programestro esperantisto s-ro Gbeglo Koffi de Lomé.

● **Skribis s-ro Agbemadon:** "Mi havas novan lernanton, la direktoron de nia mezlernejo. Li eklernis antaŭ monato kaj jam atingis la 17an lecionon... Baldaŭ li finos la tutan kurson. Estus bele, se li ricevus el la tuta mondo kelkajn bildkartojn kun gratuloj pri lia finlerno. Lia adreso estas: S-ro Kwasi Tenou Kpossou, Dir. de la College d'Enseignement Général de Zalivé, B.P. 134, Aného, Togo.

● **Svedio:** Lastatempe grupo de dudek kvar 11-jaraj infanoj kaj ok plenkreskuloj de la pola popoldanca grupo "Pieni-
no" el Krościenko (suda Pollando) sukcese turneis tra Svedio. La infanoj prezentis en dek diversaj lokoj entute 20-foje, vojaĝante preskaŭ du mil kilometrojn. La preskaŭ tute neesperantista publiko konsciigis, ke eblas uzi Esperanton en internaciaj kulturaj interŝanĝoj. En kelkaj lokoj la grupo kontaktis klasojn de samaĝuloj, ĉe kiuj ili loĝis. La infanoj daŭrigas la kontakton inter si per leteroj kaj Esperantaj studoj en la svedaj lernejoj vizititaj. La turneo donis grandan eĥon en pluraj lokaj ĵurnaloj.

● **Venezuelo:** De la 11a ĝis la 19a de oktobro 1987 Venezuela Esperanto-Asocio planas okazigi Internacia Festivalon pri Turismo, Komunikado kaj Kulturo feste al la Centjara Jubileo de la Internacia Lingvo. La festivalo, aŭspiciata de UEA, okazos en unu el la plej prestiĝaj publikaj bibliotekoj de la venezuela ĉefurbo Karakaso. La programo konsistos ĉefe el prelegoj kaj diskutoj pri la festivalaj temoj, artaj aranĝoj en Esperanto, projekciado de filmoj kaj televidprogramoj pri kaj en la Internacia Lingvo kaj pri turismo kaj folkloro.

Okazos ankaŭ diversnaciaj folkloraj spektakloj kaj ekskursoj al insuloj kaj ĝangaloj. Jam anoncis sian partoprenon diversaj movade famaj artistoj. Interesitoj povas peti detalajn informojn de: Venezuela Esperanto-Asocio, Apartado 47675, Caracas 1041-A, Venezuelo.

Fake

● **Eldonado:** Baldaŭ aperos ĉe la eldonejo Bleicher (FR Germanio) nova germanlingva poŝlibro de Richard Schulz, kiu la 12an de julio festas la 80an datrevenon de sia naskiĝo. La 248-paĝa verko (ISBN 3 88350 015 1) titoliĝas *Was nun Esperanto betrifft...* (Koncerne Esperanton...).

● **Disertacioj:** Fine de la pasinta jaro Giovanni Pala doktoriĝis en la fakultato pri fremdaj lingvoj kaj literaturoj de Universitato de Cagliari (Italio), defendinte sian 117-paĝan disertacion *Raffronto tra alcuni aspetti delle lingue Inglese e Esperanto nel ruolo di lingua*

ausiliare internazionale (Komparo inter kelkaj aspektoj de la lingvoj angla kaj Esperanto en la rolo de internacia dua lingvo). Laŭ recenzo de Aldo de' Giorgi en *L'esperanto* de majo, la revuo de Itala Esperanto-Federacio, temas pri "alte aprezinda kaj sciencnivele diskonginda verko...", kiu "analizas... la du lingvojn per absolute objektivaj, senpasiaj rezonadoj kaj argumentoj..."

● **Elektroniko:** En la elektronika firmao Ei en Niš, la plej granda tia firmao en Jugoslavio, okazas jam de multaj jaroj Esperanto-agado kaj -kursoj. Esperantistoj de la firmao lastatempe organizis ekspozicion, kiun vidis proksimume 20 mil homoj. Alilandaj laborantoj en elektronikaj industrioj povas kontakti la esperantistojn de la firmao pere de s-ro Radisavljević Tomislav, ul. Braće Tasković 4/32, YU-18000 Niš, Jugoslavio.

● **Eŭropa informado:** Aperis en 35 mil ekzempleroj "eŭropisma faldfolio" sub la nomo *Europa Esperanto* en la franca, germana kaj nederlanda. La frontpaĝa bildo montras mapon kun la nomoj de diversaj lingvoj (ankaŭ mortintaj) kaj

Foto: Lancaster Guardian



● **Britio:** La 24an de majo okazis solena malfermo de Hotelo kaj Konferencejo Esperanto en Morecambe, Britio. La foto montras (de maldekstre) s-inon Mary Davies (iniciatinton de la projekto por brita kulturdomo por la Esperanto-movado), s-inon Sheila Faith (eŭropan parlamentanon, kiu oficiale malfermis la domon), s-inon Jean Taylor (urbestron) kaj s-inon Manjo Austin (prez. de Esperanto-Asocio de Britujo). Malantaŭe estas la vicurbestrino kaj la loka parlamentano kaj turisma oficisto. Por listo de la unuaj aranĝoj de la brita Eo-konferencejo, bv. vidi la Kalendaron.

dialektoj de la regiono. Kvantoj kontraŭ pago haveblas de: Uwe Moritz, Im Römerfeld 4, D-5180 Eschweiler, FR Germanio. Tel. (02403) 66 888. Koncerne la kampanjon kun la faldfolio, aperis novaĵoj en la lokaj ĵurnaloj de Akeno *Aachener Volkszeitung* (120 mil ekzempleroj) de la 6a de majo kaj *Aachener Nachrichten* (60 mil ekz-roj) de la 7a de majo. La unua rubrikis, ke Esperanto havas nur 16 regulojn!

● **Eŭropa Konsilio:** Sekve de nia ĉefartikolo en la aprila numero pri la "Manifesto de Tours", aktiva membro skribis al la Konsilio, dirante i.a. ke ĝi ne plenumas siajn belajn intencojn, i.a. ĉar ĝi eldonas siajn dokumentojn nur en la franca kaj angla. Respondis s-ro Michael Vorbeck, Ĉefo de la Sekcio por Pedagogiaj Dokumentado kaj Esploro. Li klariĝis, ke la lingva sistemo en Eŭropa Konsilio, same kiel en aliaj internaciaj registaraj organizaĵoj, dependas de la decidoj de la ŝtatoj-membroj, ne de la organizaĵo mem.

● **Flugkompanioj:** La pola flugkompanio LOT – la oficiala flugkompanio de la jubilejara Universala Kongreso en Varsovio – promesis dum la Kongreso solene doni la nomon "Ludwik Zamenhof" al unu sia pasaĝera aviadilo.

● **Komerco:** Malofte aperas komercaj katalogoj en Esperanto. Tiu pri la industriaj produktoj de la moza regiono de Francio, *Repertoire des produits industriels de la Meuse: Kiu faras kion?*, aperis en la franca, germana, angla kaj Esperanto, kiel 92-paĝa ilustrita speciala numero de *Meuse economique* (n-ro 92). La katalogo havas indeksojn pri produktoj, entreprenoj kaj fakoj, kun priskriboj. Ricevebla kontraŭ 10 irpk-oj de: Komerc- kaj Industriĉambro de la Departemento Meuse, Parc Bradfer, F-55000 Bar le Duc, Francio.

● **Maŝintradukado:** En n-ro 5-1 (1986) de *Multilingua* aperis la anglalingva artikolo *Esperanto as the Focal Point of Machine Translation* (Esperanto kiel la fokuspunkto de maŝintradukado) de A. Neijt de Katolika Altlernejo en Tilburg, Nederlando. La 4-paĝa artikolo, referencante al la projekto DLT, argumentas, ke ne estas klare, ke tradicia Esperanto estas bona komencpunkto por elabori taŭgan "interlingvon" en la maŝintradukado.

● **Naturprotektado:** Antaŭ nelonge oni fondis Internacian Naturprotektan Asocion de Esperantistoj. Pliaj



● **Instruado:** Kiu ne preferus lerni Esperanton sur bela brazila strando ol en tradicia klasĉambro? Interalie tie sub la varma suno de Ceará okazas Esperanto-kursoj laŭ la nova instrumentado "Esperanto-ludado-metodo", kies aŭtoro, Gilberto Martins Borges Filho, bazis ĝin sur la kredo, ke la lernantoj unue devas aŭdi, simple movi kaj poste simbole (ludante kaj dramigante) paroli pri siaj konkretaj faroj, laŭ la konstato de la mondfama pedagogo Piaget: "La penso estas fakte la introspekto de la movo". Pliaj informoj pri la nova metodo kaj ties kursoj haveblas de: Esperanto-Asocio de Ceará, Rua José Marrocos 415, BR-60325 Fortaleza (Ceará), Brazilo.

informoj kaj detaloj pri ĝia provizora statuto haveblas de: R. Baross, Balzac 11, H-1136 Budapest, Hungario. Jam ekzistas Asocio de Verduloj Esperantistaj, Ekologia Rondo Esperantista, Esperanto-Sekcio de Tutmonda Unio por Vivprotektado kaj la Esperanto-Fako de La Naturamikoj. Ĉu necesas tiom da organizaĵoj sur similaj kampoj?

● **Parlamenta agado:** La 18an de aprilo aperis en *Diário do Congresso Nacional* (Jurnalo de la Nacia Parlamento) de Brazilo la teksto de parolado de la deputito s-ro Freitas Nobre, favora al oficiala celebrado de la Centjara Jubileo de Esperanto.

● **Lingvo-projektoj:** Multaj homoj preferas revii ol trakti la realon. El Aŭstralio ni aŭdis pri "Imprual" (Internacia movado por la antaŭenigo de universala helplingvo). Tiu "movado" – kun sia ĉefsidejo en Nederlando – asertas, ke ekzistantaj artefaritaj lingvoj ne taŭgas kaj ke neniuj konstruita lingvoj realigis la revojn de sia kreinto. Kvankam la revo de Zamenhof ja ankoraŭ ne plene realiĝis, la 99 jaroj de la ekzisto de Esperanto pruvis, ke la problemoj pri la oficiala akcepto de neŭtrala internacia lingvo ne kuŝas en lingvistikaj ludoj, sed en la sociaj kondiĉoj kaj sintenoj kaj manko de adekvata, ĝusta informado.

● **Fervojoj:** Post kelkjara paŭzo, la oficiala Horaro de la jugoslava fervoja sistemo denove havas klarigojn en Esperanto. La aktuala teksto ampleksas du kaj duonan paĝojn, inkluzivante i.a. informojn pri la rabatoj. La tekston preparis Gvozden Sredić, prezidanto de Jugoslavia Asocio de Fervojistaj Esperantistoj. Laŭ la lastaj informoj, Esperantaj klarigoj troviĝas en la oficialaj horaroj de la fervojaj sistemoj ankaŭ en Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Hungario, Italio, Norvegio kaj Pollando.

● **Komputa tradukado:** La 5an de junio aperis prikomputila suplemento en la brita ĵurnalo *The Guardian* (392 mil ekz-roj). Artikolo sub la titolo "Kial komputiloj lernas Esperanton" resumis la nunan staton de la maŝintradukado kaj i.a. la konatan projekton DLT (vd. en *Esperanto*, p.101/1985). Aldono al la artikolo informas, ke uzantoj de la brita komputila informsystemo Telecom Gold jam povas – tajpinte la vortojn "Info Espero" – trovi kurson de Esperanto. Strange, ke ni informiĝas pri tio el iom malnova anglalingva ĵurnalo!

● **Konkursoj:** Fundación Esperanto (Hispanio) decidis organizi internacian literaturan konkurson. La premio "Sancho Rebúllida" estos 12 mil pesetoj, kaj estos subpremio de 6 mil pesetoj. Oni



● **Odontologio:** En la Odontologia Kongreso de Brazilio (Brazilo), meze de aprilo, partoprenis ĉirkaŭ mil stomatologoj, asistantoj kaj dentoteknikistoj. En la ekspozicia halo okupis elstaran lokon la Stomatologia Sekcio de Universala Medicina Esperanto-Asocio. Ĝia vicprezidanto organizis la eksponejon kun apogo de la Esperanto-societo de la brazila ĉefurbo, kiu pretigis flugfoliojn pri la celoj kaj internacia agado de la sekcio. La foto montras d-rinon Fátima Pires, kiu volontule deĵoris dum la kongreso.

aljuĝos la premiojn al la du plej bonaj originalaj verkoj pri "Popola rakonto" aŭ "Priskribo de urbo aŭ regiono kun la monumentoj kaj tradiciaj festoj kaj moroj". La limdato estas la 15a de septembro 1986. Plenaj informoj haveblas de: S-ino I. Gastón, P. de la Constitución 35/4.º dcha, E-50001 Zaragoza, Hispanio.

● **Norvega Esperantista Ligo** anoncis tradukkonkurson por noveloj en Esperanto en iun el la du oficialaj norvegaj lingvoj. La juĝkomisiono elektis tri Esperantajn novelojn por la konkurso, el kiuj sufiĉas traduki nur unu. Ili estas *La ŝtormo* de John S. Dinwoodie, *Kolektanto de ĉielarkoj* de Tibor Sekelj kaj *La muso* de Bertram Potts. La unua premio (el tri) valoras mil kronojn. La limdato estas la 15a de septembro ĉi-jare.

● **Aŭstria Esperanto-Instituto** anoncis duteman konkurson. Temo A koncernas tradukadon en Esperanton de tekstlibro de du famaj operoj interkonsente kun nacia aŭ internacia gvida muzika instanco. Temo B koncernas verkadon de germana kaj/aŭ interkonsente Esperanta tekstlibro de la komedio de Hofmansthal *Der Unbestechliche* (La nekoruptebla servisto). Por la plej bonaj tekstlibroj AEI aljuĝos el mecenata donaco kvar premiojn de po dek mil aŭstraj ŝilingoj. La limdato estas la 31a de januaro 1987. Klarigoj haveblas de: AEI, Fünfhausgasse 16, A-1150 Wien, Aŭstrio.

● **Skulptado:** Marco Tadolini skribis al la redakcio: "Diversmaniere oni povas celebri la centjaran jubileon de Esperanto kaj ĝenerale partopreni en la esperantista afero. Mi opinias, ke ankaŭ simple utiligi la Internacian Lingvon en la ĉiutaga praktika vivo gravas." Tadolini (via Andrelini 8, I-4710 Forlì, Italio) – pentristo, skulptisto kaj ceramikisto – praktikas siajn vortojn per i.a. Esperanta reklamfolio.

● **Scienco:** La 19an de aprilo en Vraca (Bulgario) okazis Internacia Scienca Esperanto-Seminario, dediĉita al la 25-jara jubileo de la kosmoflugo de Jurij Gagarin (Sovetunio). Estis prezentitaj sciencaj prelegoj el Bulgario, Hispanio, Hungario kaj Sovetunio. La materialojn de la konferenco oni publikigos en speciala libro, kiu aperos en la fino de ĉi tiu

jaro. Ĝi haveblas de: Bulgara Astronaŭtika Societo, P.k. 279, BG-3000 Vraca, Bulgario.

● **Urbaj prosperoj:** Lastatempe aperis prosperoj pri la urboj *Duisburg* (FR Germanio), plenkolora kaj tute en Esperanto (havebla de Stadtinformation, Köningstr. 53, Duisburg, FR Germanio) kaj *Saint Raphaël* (Francio), kvarlingva, kun enmetita folio presita en Esperanto (havebla de Maison du Tourisme, Rue Jules-Barbier, F-83700 Saint-Raphaël, Francio).

● **Velŝipoj:** Frue en 1987 okazos granda internacia velŝipkonkurso ĉe Fremantle, apud Perth, en Okcidenta Aŭstralio. Grandaj velŝipoj el la tuta mondo partoprenos la plursemajnan konkurson i.a. dum januaro-februaro (la tieaj somermonatoj). La loka Esperanto-grupo deziras kontakti esperantistajn partoprenontojn aŭ spektontojn. Skribu al: S-ino S. Gradussov, 47 Waverley Road, Coolbellup, W.A. 6163, Aŭstralio.

Persone

● **Lindstedt:** Jouko Lindstedt, 30-jara, estis la 1an de aprilo oficiale nomita la profesoro pri slava filologio en Universitato de Helsinko, Finnlando. Lindstedt aktivas ĉefe en la enlanda movado, i.a. por la 36a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Rauma (Finnlando) en 1980. Li estas ano de la redakcio de *Planlingvistiko*.

● **Waringhien:** La 29an de julio prof. Gaston Waringhien, ĉefkompilinto de *Plena ilustrita vortaro*, dum multaj jaroj prezidanto de Akademio de Esperanto, festas la 85an datrevenon de sia naskiĝo.

Oficiala Informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Nederlando: Leen Hordijk; Kazimierz Prusakowski.

SOCIETO ZAMENHOF 1986

Belgio: Eliza Kehlet. FR Germanio: Elisabeth Hirsch; Heinz Schindler; Jean Prager; Werner Heinrich. Hispanio: Josep Castelltort i Riba. Italio: Medardo Biagi. Nederlando: A.M.E. van Wal-

sem-Schutte; Ru Bosong. Svedio: Edla Nilsson; William Malmsten. Svislando: Margrit Guldin. Usono: Humphrey Tonkin; Robert Swenson.

DONACOJ 1986 (gld.)
ĝis la 31a de majo.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: G. Pirlot 27,70; S-ino L. Drèze 100,00. Japanio: Gotô Hitosi 734,66; Egawa

Harukuni 33,50. Nederlando: H.B. de Vries 10,00. Svedio: H. Vedin 21,60; J. Hammarberg 10,00. Sumo ĉi-jara 1 627,07.

FONDAĴO CANUTO: Svedio: H. Vedin 40,00. Sumo ĉi-jara 455,36.

ĜENERALA KASO: Francio: R. Lemaire 352,36. Kanado: S-ino M. Hal-trecht-Matte 17,82. Nederlando: Fam. Demmendaal 25,00. Div. malgrandaj 14,71. Sumo ĉi-jara 2 491,61.

JUBILEA JARO: Usono: S-ino Ber-nice Garrett 1 300,27. Sumo ĉi-jara 2 266,97.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

KLUBO 777 (min. \$777): Usono: Eu-gene Thompson Jr.; Humphrey Tonkin. PATRONOJ (minimуме \$100): Argen-tino: Rafael Díaz Morila. Finnlando: Tapio Sormunen. Kanado: Dorothy Hawley. Kanarioj: L. Adomski. Usono: Bern Wheel; Daniel Mason; Harriet Diggs Richmond; Hiram Elwin Reed; Lanna Cheng; Lura Chapman; William Mets; Mary Murray; Ralph Lewin;

Robert Swenson; William Harmon; Wil-liam Schulze. SUBTENANTOJ (mini-mume \$25): Japanio: Inumaru Humio; Yamaga Isamu. Kanado: H.J. Lewis. Usono: Annette Greenland; Apollo Wu; Carter Beghtol; Charlene Baker; Cleo Fort; D.H. Meilander; Daniel Lieberman; Enrique Ellemberg; Francis Helmuth; Gizella Giguere; Bonnie Hel-muth; José Vazques; Kevin Carney; Minerva Massen; Karl Nell; Sharon Bourke. AMIKOJ (minimуме \$10): Belgio: L. Drèze. Finnlando: Aappo Kurikka. Svedio: Henrik Karlsson. Usono: Conrad Fisher; Harold Oatley; Adrian Hughes; John Stanley; Maya Kennedy; Leah Goldberg; Lois Roberts; Margaret Zarchy; Rudolf Couppez; René Valdés-López; Sung Ho Cho; Vincent Griffeth; Werner Simon.

PATRONOJ DE TEJO 1986


Belgio: Elvire De Coene. Israelo: Jeho-ŝua Tilleman; Josef Murĵan. Italio: Ser-gio Martina; Giuseppina Picciotto De Vita.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Anoncetoj

Tarifo: Ĉiu vorto kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj bon-volu vidi la duan kovrilan paĝon.

Vendisto en Togo (bv. vidi la foton) deziras importi ferproduktojn, aŭtojn, traktorojn, tekstilaĵojn, ŝuojn, nutra-



ĵojn, papervarojn, servojn de vojaĝ – kaj transportagentejoj. Proponu viajn pro-duktojn kaj vendkondiĉojn al: Agbema-don-Attigbe B. Mensah, CEG de Zalivé, B.P. 134, Aného, Togo.

23-jara instruisto esperas korespondi kun studentoj, tradukistoj aŭ redaktoroj de la ĉina: S-ro Wang Huazhu, Zhuang Xie, Di-8 Fen Gongshi, Guangming Jie, Shenyang, Ĉinio.

Volas korespondi tutmonde s-ro Mário Bosso, Legio de Bona Volo, Av. Rudge, 700 Bom Retiro, BR-01134 São Paulo (SP), Brazilo.

Por Esperanto-ekspozicio nova grupo deziras bildkarto-salutojn el la tuta mondo: Esperanto-Grupo "Norda Eri-kejo", Niedersachsenweg 9, D-2110 Buchholz 5, FR Germanio.

Letervesperon organizas por la 25a de oktobro 1986 Esperanto-Societo (Malta) okaze de la 25a datreveno de sia fondiĝo. Salutleteroj/bildkar-toj el la tuta mondo bonvenaj. Res-pondo garantiata. Inter la salutan-toj estos lotumita senpaga restado en Malto por du personoj. Skribu amase al: Esperanto-Societo (Mal-ta), P.O. Box 142, Valletta, Malto.

Nekrologoj

INTS ČAČE (1895-1986) mortis la 19an de marto en Rigo, Sovetunio. Lerninte la lingvon en 1911, li estis unu el la plej malnovaj esperantistoj en Latvio. Li estis aktiva kursgvidanto precipe inter blinduloj kaj gejunuloj. En 1933 aperis lia traduko de la tragedio *Amo estas pli forta ol morto* de la latva poeto Jānis Rainis.

MARCEL DELCOURT (1913-1986) mortis la 10an de aprilo en Francio. Dum multaj jaroj li estis komitatano de Unuiĝo Franca por Esperanto kaj, recenzanto kaj tradukanto, li estis la redaktoro de *Franca esperantisto* (1945-1948). Li tradukis (1983) i.a. *Lokis* de Prosper Mérimée. Delcourt aparte inter-esiĝis pri la frua movado kaj provizis la libroserion de Ludovikito per gravaj his-toriaj dokumentoj. Dum pli ol 40 jaroj li estis la delegito de UEA en Tourcoing.

JACOB KONING (1912-1986) forpasis en Haren, Nederlando. Li estis fakdele-gito en Groningen.

LUIS MIMÓ ESPINALT (1914-1986) mortis la 1an de majo en Sabadell, His-

panio. Ano de la t.n. Analiza Skolo de la Esperanta gramatiko, li aŭtoris la verkojn *Lernolibro de Esperanto*, (1959), *Perfekteco de la Esperantaj ver-boj* (dua eld. 1963) kaj *Kompleta lerno-libro de regula Esperanto* (1973). El la kataluna li tradukis (1975) du komediojn de Carles Soldevila, *Tamen, civilizitaj kaj Neĝobulo*, kaj el la kastilia (1981) la versan dramon *Don Juan' Tenorio* de José Zorrilla. Ankoraŭ restas pluraj verkoj kaj tradukoj prespretaj.

CORNELIS NELSON (1903-1986), dumviva membro de UEA, mortis en Dordrecht, Nederlando, kie li estis la delegito.

VLASTA OBRUČOVÁ (1923-1986) forpasis la 28an de marto en Olomouc, Ĉeĥoslovakio, kie ŝi estis fakdelegito.

EDUARD SCHULDENFREI (1899-1986) mortis en marto en Gotenburgo, Svedio, kie li estis fakdelegito.

KARL L. SHERWOOD (1909-1986) forpasis la 6an de marto en Amarillo, Usono, kie li estis la delegito de UEA dum 15 jaroj.

Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bonvolu sendi al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bvd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendhoroj laŭ la Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT).

ĈIUTAGE

05.30-06.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.

11.00-11.25 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.50m (9525 kHz).

11.00-11.30 Pekino, 43.13m (6955 kHz), 31.64m (9480 kHz). Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.

13.00-13.30 Pekino, 25.75m (11650 kHz), 19.50m (15385 kHz).

15.30-15.55 Varsovio, 41.18m (7285 kHz), 31.01m (9675 kHz).

16.30-16.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

19.30-20.00 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz). Speciala 30mila programo la 26an de julio.

20.00-20.30 Pekino, 40.16m (7470 kHz), 32.03m (9365 kHz), 30.10m (9965 kHz).

21.30-21.55 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22 (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

22.30-23.00 Pekino, 30.43m (9860 kHz), 26.05m (11515 kHz).

LUNDE

16.30-16.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

20.30-20.40 Verono, 185m (1621 kHz) kaj M.F. 100.5 MHz, 100.8 MHz. Radio International, Via P. Palio 36, I-37100 Verona, Italio.

MERKREDE

01.15-01.25 Berno, 48.90 (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 25.16m (11925 kHz), 24.93m (12035 kHz).

03.15-03.25 Berno, 48.90 (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).

07.45-07.55 Berno, 31.38m (9560 kHz), 25.54m (11745 kHz), 25.20m (11905 kHz), 19.27m (15570 kHz).

10.45-10.55 Berno, 25.43m (11795 kHz), 19.27m (15570 kHz), 19.25m (15585 kHz), 16.83m (17830 kHz).

13.15-13.25 Berno, 25.20m (11905 kHz),

25.09m (11955 kHz), 19.27m (15570 kHz), 19.25m (15585 kHz), 16.83m (17830 kHz).

15.15-15.25 Berno, 19.44m (15430 kHz), 19.33m (15570 kHz), 17.07m (17570 kHz), 16.83m (17830 kHz).

17.15-17.25 Berno, 30.35m (9885 kHz), 25.09m (11955 kHz), 24.93m (12035 kHz), 19.46m (15420 kHz), 16.83m (17830 kHz).

22.15-22.25 Berno, 31.17m (9625 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz), 19.33m (15570 kHz).

ĴAŬDE

05.00-05.15 Vatikano, 186m (1611 kHz), 48.00m (6250 kHz), 41.38m (7250 kHz), 30.75m (9755 kHz), 25.61m (11715 kHz), 19.84m (15120 kHz). Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

16.30-16.40 Berno, kiel lunde.

20.30-20.40 Verono, kiel lunde.

VENDREDE

16.25-16.30 Pécs, 344m (873 kHz), kaj MF 71.03 MHz, 71.81 MHz. Nur dum junio, julio, aŭgusto. Radio Pécs, Esperanto, Pf. 200, H-7601 Pécs, Hungario.

SABATE

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). Rádio Clube de Sorocaba, Esperanto-redakcio, Rua da Penha 455, BR-18100 Sorocaba (SP), Brazilo.

16.30-16.40 Berno, kiel lunde.

20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz), 31.33m (9575 kHz). Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, Centro Corrispondenza, I-00100 Roma, Italio.

Berno, kiel merkrede.

DIMANĈE

05.40-05.55 Vieno, 50.46m (5945 kHz), 50.00m (6000 kHz), 48.74m (6155 kHz), 25.16m (11925 kHz). O.R.F., Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrio.

09.45-10.00 Vieno, 50.00m (6000 kHz), 48.74m (6155 kHz), 41.84m (7170 kHz).

11.05-11.15 Budapeŝto, M.F. 67.04 MHz, 67.97 MHz, 68.24 MHz, 68.36 MHz, 68.48 MHz, 68.72 MHz, 69.38 MHz, 70.10 MHz, 70.43 MHz, 70.64

MHz, 72.08 MHz. Programo preparita de Radio Pécs, Esperanto, Pf. 200, H-7601 Pécs, Hungario.

19.00-19.10 Vatikano, 570m (526 kHz), 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.00m (6250 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj M.F. 93.0 MHz, 96.5 MHz. (ankaŭ je festotagoj).

22.00-22.15 Rio-de-Janeiro, 214m (1400 kHz). Brazila Spiritisma Federacio, av. Passos 30, BR-20051 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

21.45-22.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

ĜENERALA AŬDEBLECO

Tre multe da daŭraj aŭ ne-daŭraj aferoj povas helpi aŭ malhelpi la dissendadon de radiaj ondoj: vetero, sezono, parto de la tago, ĉirkaŭaĵo de la aŭskultanto, speco de ricevilo ktp. Tial ne eblas certigi, ĉu oni sukcesos klare ricevi elsendojn en sia lando aŭ mond-parto. Jen tamen kelkaj ĝeneralaj informoj:

ĜENERALAJ INFORMOJ

a) Direktitaj ondoj. **Berno**: je la 01.15h al Centra kaj nordo de Suda Ameriko; je la 03.15h al Centra kaj Norda Ameriko; je la 07.45 kaj 10.45h al Malproksima Oriento; je la 13.15h al Oriento; je la 15.15h al Proksima Oriento; je la 17.15h al Arabio kaj Afriko; je la 22.15h al Suda Ameriko. **Pekino**: je la 11.00h al Japanio kaj Koreio; je la 13.00h al Sudorienta Azio; je la 20.00h al Eŭropo; je la 22.30h al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 9625, 11700 kaj 15120 kHz je la 19.00h al Afriko. **Vieno**: 11925 kHz al Proksima Oriento; 6155 kHz al okcidenta Nord-Ameriko.

b) Nedirektitaj ondoj kapteblaj longdistance: ondoj ne listigitaj ĉi-supre sub a) el **Berno, Romo, Varsovio, Vatikano, Vieno, Zagrebo**.

c) Nur loka aŭskultebleco por **Budapeŝto** kaj **Pécs** (ankaŭ en eksterlandaj apudlimaj regionoj), **Rio-de-Janeiro**, **Sorocaba**, **Verono** kaj ĉiuj disaŭdigoj per modulita frekvenco (MF).

SEZONA HORŜANĜO

Ekde la 28a de septembro la elsendoj el Berno (nur la eŭropa programo je 16.30h), Budapeŝto, Vatikano, Verono, Zagrebo estas aŭskulteblaj horon pli malfrue laŭ UTC.



Koresponda
Servo
Mondskala
de UEA

Petu la novan informilon de: KSM, p/a R. Llorens, 121bis,
BD. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

Esperanto und Wissenschaft Zur Plansprachenproblematik de Detlev Blanke

Elstara informilo por lingvosciencistoj. Informriĉa germanlingva skizo, kiu science traktas planlingvojn, interlingvistikon, la planlingvon Esperanto, kun bibliografioj de sciencaj verkoj.

Eld. Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Berlino, 1982 (represo). 88p. 21cm. Prezo: 12,00 gld. de la sola distribuanto Libroservo de UEA (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).

ESPERO POR SENESPERA MONDO:

Jen tre grava kaj urĝa mesaĝo pri la konfuzita mondo. Skribu por senpaga libreto al: *INTERNACIA BIBLIO-MISIO*, 29 Plantation Road, Poole, BH17 7LN, Britujo.

Vizitu Ĉinion post la Universala Kongreso!

La kongresanoj certe parolos entuziasme pri siaj travivaĵoj en Ĉinio, pri la lando, pri la homoj, pri la vidindaĵoj. Kaj nun ankaŭ vi ŝatus flugi al Pekino, Xi'an, Ŝanhajo, Honkongo. Esperanto-Centro Paderborn flugis kun 95 personoj al la UK kaj en aŭtuno helpos efektiviĝi ankaŭ viajn planojn. Ni organizas por vi tri vojaĝojn al la Meza Lando kun esperantistaj renkontiĝoj en laŭeble ĉiu vizitota urbo. Jen la tri vojaĝoj:

Vojaĝo A: *Imperiestraj urboj, metropoloj kaj budhismaj centroj*

Frankfurto, Honkongo, Kantono, Guilin, Ŝanhajo, Luoyang, Xi'an, Pekino, Frankfurto. **Datoj:** 23 okt. – 7 nov. 1986; 16 tagoj. **Prezo:** 6 080 DM.

Vojaĝo B: *Ĉinio hieraŭ kaj hodiaŭ, naciaj malplimultoj, plej granda akvofalo en Azio*

Frankfurto, Honkongo, Kantono, Guiyang, Kunming, Xi'an, Luoyang, Pekino, Frankfurto. **Datoj:** 29 okt. – 14 nov. 1986; 17 tagoj. **Prezo:** 5 790 DM.

Vojaĝo C: *Brilaĵoj de Ĉinio kun Xi'an kaj Guilin, kaj sinbando sur filipina insulo*

Frankfurto, Pekino, Xi'an, Guilin, Kantono, Honkongo, Manilo, Agoo Playa, Manilo, Frankfurto. **Datoj:** 20 dec. – 03 jan. 1987; 15 tagoj. **Prezo:** 5 095 DM.

Interesitoj petu detalan prospekton de:

Esperanto-Centro, Postfach 1450, D-4790 Paderborn, FR Germanio.

PLENA ANALIZA GRAMATIKO



UEA

Post la monumenta *Esperanta antologio* aĉetebblas la dua volumo en la prestiĝa Jubilea Kolekto *Jarcento de Esperanto*:

la kvina, korektita eldono de

Plena analiza gramatiko de Esperanto

de Kalocsay kaj Waringhien

Ĉi tiu fama verko malkovras la tradician, klasikan uzadon de la lingvo. En ĝin la aŭtoroj metis la resumon de siaj konstantaj esploroj pri la lingvaĵo de Zamenhof, Grabowski, Kabe kaj aliaj plej famaj aŭtoroj kaj la plej bonan el sia sperto kiel tradukistoj. Temas pri praktika helpilo pri la lingvouzo. Korektita de Gaston Waringhien. Kun grafika aranĝo kaj la kompleta indekso de la temoj. Kovrilo speciale desegnita de Franko Luin.

Plena analiza gramatiko de Esperanto (1935) de Kálmán Kalocsay (1891-1976) kaj Gaston Waringhien (1901).

Rotterdamo: Universala Esperanto-Asocio, 1985 (5a, korektita eldono). 599p. 22cm. Bindita. ISBN 92 9017 032 8. Prezo: **48,00 gld.** plus sendokostoj. (Rabato de unu triono por samtempa mendo de minimume 3 ekzempleroj.)

Libroj de TK/Stafeto

<i>Ĉu li bremsis sufiĉe?</i> Johán Valano	12,00
<i>Ĉu li venis trakosme?</i> Johán Valano	18,00
<i>Ĉu ni kunvenis vane?</i> Johán Valano	21,00
<i>Ĉu ŝi mortu tra-fike?</i> Johán Balano	15,00
<i>Du el</i> M. Boulton/P. Thorsen	33,00
<i>Esperanto aŭtodidakte</i> Audrey Childs-Mee	24,00
<i>Fabeloj de la verda pigo</i> Louis Beaucaire	18,00
<i>Hieraŭ – hodiaŭ – morgaŭ</i> Bernard Golden	12,00
<i>Hieroglifo</i> Julia Pióro	9,60
<i>Je la flanko de la profeto</i> Italo Chiussi	30,00
<i>Kaj la ceter' nur literaturo</i> Gaston Waringhien ..	36,00
<i>Kara diablino</i> Douglas Boatman	9,00
<i>Kaverno apud la maro</i> Bertram Potts	27,00
<i>Kumeŭaŭa</i> Tibor Sekelj	9,00
<i>Lidja Zamenhof</i> Isaj Dratwer	9,00
<i>Misio sen alveno</i> John Francis	21,00
<i>Primico</i> Robindronath Tagor	9,00
<i>Trofeoj</i> Maria de Heredia	9,00
<i>La vuala de l' tempo</i> J.H. Sullivan	19,50

La Libroservo de UEA donas **rabaton de unu triono** (plus sendokostoj de 10%, kun minimumo de 5,00 gld.) por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj de samtitola libro, sendotaj al la sama adreso.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Popularscienco por instruistoj kaj lernantoj, abunde ilustrita per desegnaĵoj kaj figuroj:

Amuza matematiko por gelernantoj

de Petko Arnaudov
kaj Ljudmila Arnaudova

El la bulgara tradukis la aŭtoroj, konataj aktivuloj de Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj. En la praktikaj konsiloj, bone elektita serio de taskoj kaj amuzaj historietoj sentiĝas la sperto de la ĉiutaga instruado. Jen la pruvo, ke la matematiko povas esti amuza:

Preskaŭ cent paĝoj da ★ *"matematikaj kunvenoj" por divers-aĝaj (-sciaj) grupoj*

★ *ĝeneralaj konsiloj*

★ *pensoj kaj rakontoj pri*


matematiko kaj matematikistoj

★ *ĉu vi scias, ke...?*

★ *taskoj kaj demandoj por konkursoj*

★ *poemoj* ★ *respondoj kaj solvoj*

Eldonis Scienca Eldona Centro de UEA. Budapeŝto, 1984. 99p. 21cm. ISBN 963 571 129 8. Prezo: nur 9,90 gld. (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj). Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



Ĵus aperis

Amo kaj morto en Balio de Vicki Baum

Verko pri la aŭtentika tradicia vivo de la balianoj kaj ties moroj. En la formo de romano, ĝi rakontas pri homaj sortoj dum historiaj okazaĵoj ĉirkaŭ la renkontiĝo kun la nederlanda kolonia potenco en la pasinta jarcento.

Kun kovrilo speciale desegnita de Peter Oliver.

Amo kaj morto en Balio (1937) de Vicki Baum (1888-1960). El la germana tradukis P.H. Mooij. Roterdamo: UEA, 1986. 420p. Formato A5. ISBN 92 9017 033 6. Prezo: 28,50 gld. plus sendokostoj. Mendu de Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. (Rabato de unu triono por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj al la sama adreso.)